


HORIZONTO

IV-a JARO N-o 22 (4)
JULIO - AŬGUSTO 1979

KULTURA KAJ INFORMA REVUO



ANKORAŬ PRI LA TRADUKARTO

VORTOJ DE SIMPLULO

FABELO PRI MALAPERINTA PRINCINO

DE LA NEŬTRALA ESPERANTO MOVADO

HORIZONTO

Direktorino
Inés Gastón
Redakta Komitato
Salvador Gumá
Juan Régulo
Jean Thierry
Red. kaj Adm.
Inés Gastón
P.º Marina Moreno, 35
Telf. (976) 22.05.21
Zaragoza-1 (Hispanujo)
Eldonkvanto 1.000 ekzempleroj
Dumonata revuo
Presita en Zaragoza
ĉe "Tipografía C. Boloix"
str. Reina Fabiola, 7, Zaragoza-8
Leĝa Depono Z-133-76

N.º 4 - Julio - Aŭgusto 1979

E N H A V O

ESPERANTO-ORGANIZAJOJ LAŬ LA SO-
VETA KONSTITUCIO (Ivo Lapenna)

VORTOJ DE SIMPLULO (Roger Bernard)
LA BONKORA PASTISTO... (Jean Thierry)
ANKORAŬ PRI LA TRADUKARTO
(G. Waringhien)

BELETRO

Didaskalio al la sesa akto (trad. Jan Smykalski)

x x x (trad. Jan Smykalski)

Korpordegoj (trad. J. Kohen-Cedek)

ĈU VI KONSENTAS? (trad. G. Mora i Arana)

FABELO PRI MALAPERINTA PRINCINO
(trad. N. Z. Maimon)

ANALIZO DE KELKAJ ASPEKTOJ DE
LA DEMANDO PRI -IO kaj -UJO (Bernard Golden)

ATENO (J. M. U.)

TRA LA ESPERANTO-GAZETARO Redak-
tas (Jean Thierry)

LIBROJ SUB LA LUPEO Recenzas
(G. Mora i Arana kaj Salvador Gumá)

MALLONGE

V-a INTERNACIA KONFERENCO DE
N.E.M.

KIEL ABONI?

Abonojn al "Horizonto" akceptas la Ad-
ministracio: Inés Gastón, Paseo Marina
Moreno, 35, Zaragoza-1, Hispanujo. Pĝk.
Zaragoza 00428398 (Jarabono 500 ptoj.), aŭ
la sekvantaj.

PERANTOJ

Aŭstrujo:

Dro. Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020
GRAZ. Pĝk. Graz 1257.845. Jarabono:
160,— S.

Britujo:

Geoffrey King, 14 Elmdale Road, LONDON
N13 4UL. Pĝk. 37.507.9106. Jarabono 5 £.

Danlando:

Peter Zacho, Nørregardsvej 91, DK-2610
RØDOVRE, Pĝk. 6287859. Jarabono: 60,—
D Kr.

Finlando:

Finna Esperanto-Librejo, PL 221, SF-70101
KUOPIO 10, Pĝk KU 152801-5. Jarabono:
38,— F. Mk.

Francujo:

André Bourdeaux, 91 rue de la Chapelle,
F-75018 PARIS. Pĝk. Paris 21.670.96 V.
Jarabono: 40,— Fr.

FR Germanujo:

Heinrich Müller, Mommsenstrasse 5,
D-3000 HANNOVER 1. Pĝk. Hannover 120
854-301. Jarabono: 24,— DM.

Grekujo:

Adda Sakelaropoulou, Sokratous 88 Omo-
nia, ATHENO 101. Jarabono: 380,— Grekaj
Drakmoj.

Israelo:

Ben-Alder Jehiel, P. O. B. 379, PETAH
TIKVA. Pĝk. Bank Hadoar, 4-45854-8.
Jarabono: 84 izr. liroj.

Jugoslavio:

D-ro Oton Pancer, Voćarsko Naselje 10,
YU-41000 ZAGREB. Jarabono: 180 n. din.

Kanado:

Kriss Smilga, 34 Martin Road. TORONTO
Ont. M4S 2V2. Jarabono: 10,— \$.

Luksemburgo:

Wickler Albert, OLM. Pĝk. 54175-49. Jara-
bono: 380 lfr.

Rumanujo:

Mihail Petre Dungeanu, P.O. Box 502
R-5806 SUCEAVA.

El ĉiuj aliaj landoj oni pagu al unu el
tiuj perantoj, ĝis peranto en tiu lando
estos trovita. Personoj pretaj funkcii kiel
perantoj, bv. sin turni al la direktorino.

PLEJ GRAVAJ VERKOJ

Eldonejo: PLAZA & JANES, S. A.
ESPLUGAS DE LLOBREGAT
(Barcelona - Hispanujo)

ESPERANTO-ORGANIZAĴOJ LAŬ LA SOVETA KONSTITUCIO

Laŭ informo publikigita en la aprila *Esperanto* kaj en pluraj aliaj periodaĵoj, la 14-an de marto estis fondita en Moskvo Asocio de Sovetaj Esperantistoj (ASE).

Analizante la novan statutoprojekton de UEA ni klarigis en *Horizonto* n-ro 1/79, ke la forigo de art. 13 de la nuna valida Statuto, signifas leĝigon de la nuna kontraŭneŭtraleca praktiko de la posthamburga gvidantaro de UEA (p-oj 3-4). Siavice, Dro Albault, membro de la Akademio de Esperanto, per firmaj kaj kortuŝaj vortoj pledis por la partipolitika neŭtraleco kaj sendependeco de UEA en artikolo «UEA devas esti libera de direktivoj...» (*Horizonto*, n-ro 2/79, p. 26). En aparta cirkulero, kiun mi sendis komence de februaro al ĉiuj sendependaj landaj asocioj kaj al pluraj elstaraj aktivuloj, estis dirite:

«Eĉ pli, dum laŭ la Statuto neŭtrala asocio nur povas aliĝi, laŭ la projekto eĉ *evidente malneŭtrala*, politika instanco rajtas aliĝi al UEA, kio fakte kaj jure rdukta al nulo la rolon de la Komitato decidi pri aliĝo de LA laŭ art. 28 (ĉ) de la projekto (art. 27 de la Statuto). Fine, la projekto forigis la regulon de art. 13, ke principe UEA akceptas al unu regno nur unu landan asocion... Se tiu art. de la projekto estos akceptita, nenio malhelpos, ke en la estonteco, eble baldaŭa, ekzemple Soveta Unio formu en siaj 15 uniaj respublikoj 15 partipolitikajn Esperanto-instancojn, ĉiun kun precize 100 «membroj», kio rajtigos ilin aliĝi al UEA kaj aŭtomate donus al ili 15 komitatanojn A laŭ art. 22 de la projekto.»

Ĉu 15 «asocioj» en USSR?

Ni ĵus ricevis sciigon de soveta esperantisto, ke en ĉiu el la 15 uniaj respublikoj «ekzistas aparta respublika asocio (filio) de ASE». La plusendinto de tiu sciigo nomis mian antaŭvidon de tiu ebleco «vere profeta» kaj aldonis: «Kiom da respublikoj en USSR, tiom da asocioj influos en UEA-n kaj niaj okcidentaj asocioj estos ege malpezaj kompare kun tia invado, kaj restos al ili nur la ebleco sklave obei al la 'diktatoj' de la sovetlandaj kaj satelitaj Esperanto-asocioj».

Komprenoble, tute ne temas pri profetaĵo, sed tutsimple pri antaŭvidita probableco surbaze de analizitaj faktoj, se la sendependaj LA en UEA kaj iliaj komitatanoj ne konsciigos en tiu ĉi lasta momento kaj ne rekondukos la Asocion al la tradicia neŭtraleco, interalie ankaŭ konservante la esencajn art. 4, 13, 16, 21 kaj 27 de la Statuto — kaj agante konforme.

En la verko *Hamburgo en Retrospektivo (HeR)* kaj en *Horizonto* troviĝas amaso de nekonstestebaj pruvoj, ke nombro da Esperanto-instancoj («landaj asocioj») agas aperte en UEA laŭ partipolitikaj direktivoj. La ĵus ricevita numero 1/79 *der esperantist*, organo de la t.n. «Centra Laborrondo de la Kulturligo de GDR» («aliĝinta asocio») estas plian fojon plena de partipolitika propagando, precipe en la «Konkluda Deklaro» de 15.10.1978: «Imperialismaj rondoĵoj» ĉepinte, komprenoble, kun la «usona registaro», «kontraŭimperialisma tendaro», gvidata, same komprenoble, de Soveta Unio, «partopreno en la akriĝinta klasbatalo inter imperialismo kaj socialismo», «proleta internaciismo», ktp., ktp., ĉio kun la celo «altigi sian aktivadon kaj sian mondrigardon en la internacia Esperanto-Movado» (p-oj 1-2). Pli apertan, pli klaran, eksplicitan konfirmon de la vera senco de la hamburga puĉo kaj de ĉio prezentita kaj analizita en *HeR* oni apenaŭ povas imagi. Tiuj, kiuj daŭre plu serĉas iajn «pliajn pruvojn» pri la rolo de tiaj instancoj en UEA — ni emfazas: en UEA, ĉar nur pri tio temas — bv. mem legi la koncernen Deklaron en la germana, aŭ havigi tradukon, se ili ne komprenas tiun lingvon.

Sed ĉu nuntempe povas esti alimaniere? Kio pri la ĵus fondita Asocio de Sovetaj Esperantistoj (ASE)? Ĉu ĝi povas esti partipolitike neŭtrala?

Kion diras la Soveta Konstitucio

En Soveta Unio ne ekzistas, nek povas ekzisti, sendependaj organizaĵoj de civitanoj. Art. 6 de la nuna Soveta Konstitucio de la 7-a de oktobro 1977 preskribas:

«La gvida kaj direktanta forto de la soveta socio kaj la nukleo de ĝia politika sistemo, de ĉiuj ŝtataj kaj sociaj organizaĵoj, estas la Komunista Partio de Soveta Unio...»

«La Komunista Partio, armita per Marksismo-Leninismo, difinas la ĝeneralajn perspektivojn de la evoluo de la socio kaj la linion de la interna kaj eksterlanda politiko de USSR, gvidas la grandan konstruan verkon de la soveta popolo, kaj donas planitan, sistemigitan kaj per teorio apogitan karakteron al ĝia batalo por la venko de komunismo.»

Laŭ la sovetaj Konstitucio kaj juro la esprimo «sociaj organizaĵoj» rilatas al ĉiuj organizaĵoj, kiuj ne estas ŝtataj instancoj, ekzemple al diversaj sciencaj, kulturaj, sportaj kaj similaj unuigoj. Al tiu grupo apartenas ankaŭ la ĵus fondita ASE kaj la eventualaj Esperanto-instancoj en la 15 uniaj respublikoj. Apenaŭ necesas kia ajn komento: pli ol evidente ASE kaj ĝiaj filioj devas agi laŭ art. 6 de la Konstitucio, nome strikte observi la oficialan partipolitikan linion kaj la konkretajn direktivojn de la Komunista Partio, la «nukleo» de ĉiuj «sociaj organizaĵoj». Kiel bone konate, ĉar multfoje montrite en *HeR* kaj en *Horizonto*, la sekretajn kaj nesekretajn kunvenojn de la Esperanto-organizaĵoj aŭ instancoj el la blokaj landoj en la lastaj jaroj ĉiam partoprenis almenaŭ unu reprezentanto el Soveta Unio, kies direktiva voĉo estis decida. Nun, post la fondiĝo de ASE oni povas kun certeco antaŭvidi, ke, konforme al art. 6 de la soveta Konstitucio, la rolo

de ASE fariĝos eĉ pli decida, eĉ se ASE kaj ĝiaj 15 «filioj» ne tuj aliĝos al UEA. Pro la gvida pozicio de Soveta Unio en la bloko oni, do, povas en ĉiu okazo atendi eĉ pli intensajn propagandon kaj agitadon *en UEA* favore al la partipolitikaj interesoj de Soveta Unio, aŭ, kiel deklaras la Soveta Konstitucio, eĉ pli planitan, sistemigitan kaj «per teorio» apogitan batalon por la venkigo de «komunismo», t.e. de sovetismo. Tio, siavice, kaŭzos eĉ pli profundan politikan kompromitiĝon de la Asocio.

Ankoraŭfoje estu emfazite, ke en *Horizonto* aperus eĉ ne unu vorto pri tiu afero, se la interesoj de Esperanto ne postulus tiun ĉi atentigon. Se la sovetaĵoj civitanoj, inclusive la sovetaĵoj Esperanto-parolantoj, estas feliĉaj havi organizaĵojn laŭ art. 6 de la Konstitucio, kiel kredigas la unuanima akcepto de la Konstitucio fare de la Supera Soveto de USSR, tio estas ilia afero, en kiun *Horizonto* kiel laŭparolilo de la partipolitike neŭtrala Esperanto-Movado ne enmiksiĝus. La samo rilatas al la Esperanto-instancoj troviĝantaj en simila jura kaj fakta situacio. La demando, kiun ni starigas kaj pro kiu estas skribitaj la supraj vortoj, estas: kial UEA, kiu ekde 1908 ĝis la UK de 1974 estis partipolitike neŭtrala kaj sendependa asocio, ne influata de kiujn ajn partipolitikaj aŭ aliaj ekstermovadaj faktoroj, devus toleri partipolitikan propagandon *en sia sino*? Kial nun, per la nova statut-projekto, ĝi devus eĉ formale ŝanĝi la tradiciajn regulojn pri neŭtraleco, kio kaj fakte kaj jure signifas adapti sian Statuton al la postulato art. 6 de la Soveta Konstitucio — postulato, kiu en ĉiu okazo, eĉ sen tiu konstitucia artikolo, estas politika realaĵo en la landoj de la bloko, en iuj pli akcentita, en aliaj malpli.

La respondo donos la Komitato de UEA en Lucerno kaj poste, eventuale, la membraro en la ĝenerala voĉdono. Finfine, almenaŭ grandparte ĉiu estas forĝisto de sia sorto. Ankaŭ UEA.

Ivo Lapenna

La 15-an de Junio 1979.
al la Membroj de la Akademio de Esperanto,
al U.E.A., S.A.T.— diversaj gazetoj ktp.

VORTOJ DE SIMPLULO

Mi ne komprenas. Mi demandas min, kial nuntempe tiom da t.n. adeptoj de la lingvo Esperanto, ofte ne la malplej elstaraj, dediĉas tiom de sia tempo kaj talento por okupiĝi pri tiuj mortnaskitaj insektoj, nome: lingvoprojektoj aŭ planlingvoj, ekz. volapük, ido, interlingua, occidental, kaj aliaj el la sama barelo, kun la risko doni al la publiko la impreson, ke vivas tiuj larvoj, kaj risko sekve endanĝerigi la pozicion de Esperanto. Kun kia ŝajne rava plezuro ili dissekcas tiujn kadavrojn, anstataŭ eluzi sian talenton al studado de la nerifuteblaj valoroj de Esperanto, al ĝiaj eble ankoraŭ ne ekviditaj latentoj, aŭ tute simple al polurado kaj perfektigado de la lingvo per abunda verkaro *ne* interlingvistika. Tiuj doktaj personoj igas min pensi pri tiuj sciencistoj, kiujn entuziasmigas la studado de la erotikaj impulsoj ĉe la ameboj... Ne! Estimataj Sinjoroj, Esperanto vivas, milfoje pruvis sian taŭgecon, kaj ne bezonas komparon kun palaj ektoplasmoj. Mi vere petas vin, deturnu vin de vanaj kaj senutilaj esploroj; viajn kapablojn dediĉu al io pli inda je vi. Ĉu mi diru anticipan dankon?

Dume, aliaj homoj, kaj eĉ akademianoj(!), tiklataj de mi ne scias kia inventemo, proponas (denove!) ŝanĝon de la ortografio, per enkonduko de «q, w, x, y» (ĉu ĉiuj, ĉu nur parte, ĉar iliaj sistemoj ne ĉiam estas similaj), tiel volante doni al Esperanto la finan kvaliton, kiun ĝi laŭ ili ankoraŭ ne posedas por venki la mondon. Ĉar ilia ĉefa argumento estas la laŭdire malutilaj ĉapelitaj literoj. Nu, mia preskaŭ kvindekjara prezento de la fakto «Esperanto» al multnombraj homoj: parencoj, amikoj, grupoj aŭ societoj, montris al mi, ke, se ĉiuj agnoskas la utilecon de Esperanto por solvi la lingvajn barilojn, ili tamen, krom tre malofta escepto, ne lernas ĝin, preferante barakadati per sia aborta scipovo de unu aŭ du fremdaj lingvoj. Sekve, tute ne ĝenas ilin, kaj ankaŭ ne la finan venkon de Esperanto, la uzo de la ĉapelitaj literoj. Kiuj literoj cetere ne malhelpis dum pli ol 90 jaroj la eldonadon de miloj kaj miloj da verkoj en nia lingvo. Unu sola ekzemplo: kiam mi eldonis proprakoste la du teatraĵojn de Sartre de mi tradukitajn, mi turnis min al amiko, posedanto de tute ne granda presejo, kaj li tre facile kaj malmultekoste povis akiri la necesajn litertipojn.

Kial do senutile atenci la Fundamenton, kaj senfine prokrasti la iam venontan sukceson de la solvo, kiun ni prezentas al la mondo? Reformemuloj haltu en sia malutila laboro, kaj ili alimaniere laboru por la celo, verŝajne komuna al ili kaj al centmiloj da aliaj, kiujn tute ne ĝenas la ortografio de Esperanto.

Roger BERNARD
Membro de la Akademio
de Esperanto

LA BONKORA PAŝTISTO...

En la aprila numero de «esperanto» en 1979 Simo Milojević emfaze insistas pri la neŭtraleco de la asocio kaj precipe de la nova statuto sub la aŭspicio de la tuta familio Tonkin kaj de la simbola sinteno de Svislando, kie okazos la venonta kongreso. Sub la titolo «VIGLA INTERSANGO DE OPINIOJ» li prezentas resumon de komentoj senditaj al la Komisiono pri Statuto. Kaj por plej demokratece pritrakti la aferon, li alvokas al pliaj reagoj...

Resumo estas ĉiam tre delikata afero: kiom da malsamaj orientiĝoj oni povas fari per tia procedo! Ekzemple, jam de la komenco la vojo estas elektita:

«La ĝenerala opinio pri la projekto estas aproba. Eĉ nia eksprezidanto prof. Lapenna, forta kritikanto de la nuna laboro de UEA, asertis, ke «en la projekto troviĝas 1-2 utilaj eroj», sed li ankaŭ atentigas pri «tre multaj kaj principaj kaj teknikejuraj malutilaj, eĉ danĝere malutilaj klaŭzoj.»

Kompreneble la raportantoj de la komisiono substrekas la aprobon de prof. Lapenna pri «1-2 utilaj eroj», sed, eĉ se ili mencias, ke li «atentigas pri tre multaj... malutilaj klaŭzoj», ili nepre sin gardas pri indiko de tio, pri kio temas, tiel ke la lasta impresio restas aprobo, eĉ des pli ke ili tuj aldonas:

«Kontraste al prof. Lapenna s-ro Moritz juĝas la projekton «multe tro konservema». El tio rezultas, ke la projekto laŭ s-ro Fighiera «troviĝas sur bona vojo».

Hej! Kiu diros la kontraŭon, estos ia Beoto, aŭ filistro! Tiel nun oni verkas historion!

—oOo—

Poste oni povas dronigi la fiŝon en vortdetalaĵojn.

«Ce CELOJ a) s-ro Jossinet proponas aldonon: 'divstavigi la uzadon de la Internacia Lingvo Esperanto.»

Fakte post la artikolo «VOLAPUKO CENTJARA» en «La Brita Esperantisto» tia mencio ŝajnas nepre necesa, por ke oni ne subite vekigu en asocio por divstavigo de nova dialekto!

«S-ro Majchert proponas aldoni post 'Esperanto' la vortojn kontinuiganta pasintan lingvon latinan.»

Ankoraŭ ĉi-foje jen grava aldono precipe por la aziaj kaj afrikaj popoloj!

«Ce b) unu leganto (s-ro Beckers) opinias la nocion 'spiritaj rilatoj' malklara, s-ro Moritz rekomendas skribi 'nacio' anstataŭ 'nacieco', kaj s-ro A. Sekelj opinias la mencion pri 'sekso' superflua, «ĉar ĉe esperantistoj neniam aperis tiu problemo.»

Supozeble la esperantistoj estas kiel la aĝeloj senseksaj! Sed ni ne disputu pri tia historia punkto!

—oOo—

Multe pli interesa estas la komento, «kiam temas pri la Neŭtraleco de la Asocio.»

«S-ro Jossinet (denove li malfermas la debaton) rekomendas forstreki la frazoparton 'kiuj ne estas lingvaj problemoj', ĉar — laŭ li — UEA havas nek juran kapablon nek kompetentecon proponi solvojn pri la dulingva problemo en Belgio ktp., ne rompante sian politikan neŭtralecon.»

Tiel same laŭ tia propono UEA devus ne interveni en la konkuradon inter la angla kaj la franca lingvoj por ne rompi sian neŭtralecon rilate al la angla kaj franca registaroj! Sed s-ro Jossinet pluen iras.

«Argumentante, ke en multaj landoj (ekz. Francio) Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj ne estas leĝe oficialigita, kaj ke en la praktiko 'esenca kondiĉo' povus signifi 'interveno, se necesa, kiel ĝendarmo', s-ro Jossinet proponas pli mildan vortumon: «UEA rekonas kiel moralan referencon Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj kaj sentas la bezonon de bonaj internaciaj rilatoj.»

Nu, necesas rimarkigi, ke en la franca juro (same kiel en multaj aliaj) ne ĉiuj fontoj estas «leĝe oficialigitaj»: krom la leĝa formo oni agnoskas ankaŭ la kutiman, la doktrinon kaj la jurisprudencan. Sekve, se la Universala Deklaracio ne estas formale «leĝe oficialigita», la franca juro konas pli ol unu deklaron de homaj rajtoj, kaj doktrine jam aplikas de longe la principojn; kio estas pli efektiva ol belavorta oficialigo sen reala praktiko! Sed nuntempe, kiam ekzistas tutmonda publika opinio, kiu agnoskas la Universalan Deklaracion, kial tiom da skrupuloj pri ĝi, se ne enestas pli kaŝitaj motivoj, kiuj eĉ ne kuraĝas esprimiĝi tute libere? Kion pli klare precizigas prof. Waringhien en sia interveno:

Li «atentigas, ke rigardi la 'respekton de la homaj rajtoj esenca kondiĉo' jam signifas 'preni starpunkton pri sociaj kaj politikaj problemoj'. Li proponas jenan formulon: 'UEA estas neŭtrala, kio signifas, ke principe ĝi rifuzas favori iun ajn ŝtaton aŭ ŝtatblokon kontraŭ alia; sed la ĉi-supre difinitaj celoj postulas, ke ĝi aktive laboru por la plibonigo de la internaciaj rilatoj kaj por la respekto de la homaj rajtoj.»

Unua rimarko estas, ke alvoko al homaj rajtoj sen referenco al iu ajn preciza deklaro restas pli ol svaga nocio. Dua rimarko elstaras, ke temas ne nur pri favoro al iu ŝtato aŭ ŝtatbloko, sed ankaŭ pri filozofiaj doktrinoj, religiaj dogmoj kaj precipe politikaj ideologioj. Tial, kial do ne simple agnoski Deklaracion, kiun rekonas nun la plimulto el la internacia publika opinio? La vero estas simpla timo malplaĉi al la bolŝevismo kiel sovetsismo!

Kaj tiel plu sekvas aliaj proponoj, kiuj ĉiuj fontas el la sama timo.

«S-ro Veen deziras substreki, ke esenca kondiĉo por la laboro de UEA estas «etosoj de toleremo inter diversaj vivkonceptoj kaj doktrinoj.»

Toleremo estas nocio tre delikata, eĉ danĝera fronte al netoleremaj ideologioj, kiuj ne maltrafos la okazon de toleremo por plej bone sufoki vin! Toleremo povas plu vivi nur inter toleremaj sistemoj!

«S-ro Zlata proponas tute novan formulon: 'UEA estas tutmonde neŭtrala organizo de esperantistoj. Tio signifas, ke ĝi ne aliĝas al iuj politikaj doktrinoj, partioj, ŝtatoj, grupoj de ŝtatoj, religioj, ideologioj. Ĝi respektas la personajn opiniojn kaj sentojn de siaj anoj. Aplikante striktan neŭtralecon ĝi kunordigas iliajn agadojn en amika, tolerema agordo por la disvastigo de Esperanto kaj ĝia humanisma ideologio...»

Kiel klare videble, temas ĉi-foje preskaŭ pri tuta deklaro de principoj... Sed denove, kial ne adopti la Universalan Deklaracion, se ne pro timo malplaĉi al la netoleremaj partizanoj de la soveta komunismo? Ĝuste pro toleremo ŝafo estas formangita de lupo!

—oOo—

Poste sekvas amaso da pli malpli trafaj detalaj aldonoj aŭ elstrekoj, el kiuj du aŭ tri meritas apartan substrekon.

«S-ino Borĉic rekomendas, ke oni limigu la oficdaŭron de komitatanoj al tri sinsekvaj deĵorperiodoj... Dum s-roj Majchert, Verloren van Themaat, Beckers kaj Støp-Bowitz sin esprimas kontraŭ ia ajn limigo de la prezidanta mandato, s-ro Fighiera opinias: 'La limigo de la prezidanta mandato estas tiel bona rimedo kontraŭ sklerozeco, ke mi proponas etendi ĝin al ĉiuj estraranoj.'»

Por ĉiuj, kiuj longe spertis en la movado la malfacilon trovi kapablajn homojn, kiuj konsentas preni sur sin la ŝarĝon de komitatano aŭ estrarana ofico, tiaj limigaj pretendoj estus nur ridindaj, se ili ne estus danĝeraj por la asocio, faciligante pli vaste la pordon al nuraj ambiciuloj: jam komitatano A ne tiel facile trovas anstataŭanton!

S-ro Fighiera «proponas unue: 'Grava akuzo aŭ konflikto estas esplorata de tri-persona konfliktkomisiono, kiu, en kazo de konflikto, penas atingi pacan solvon. Ĝi rajtas proponi al la Estraro la eksigon de membro. Ĝiaj konkludoj estos submetitaj al la Komitato, pere de la Centra Oficejo, en la daŭro de tri monatoj ekde la ricevo de ĉiuj dokumentoj'».

Jen kio efektive faciligos la eksigon de nekonformisma membro: sufiĉas bone elekti la membrojn de la konfliktkomisiono! La institucio estas des pli danĝera en la nunaj cirkonstancoj, ke jam de 1974 regadas cenzuro en «esperanto» kaj ĝenerale ia intelekta ekskluzivigo.

«Li (Fighiera) ankaŭ sugestas, ke oni starigu 'kolegion de estintaj prezidantoj'. Eksprezidantoj, laŭ tiu propono, rajtus 'ĉeesti ĉiujn kunvenojn de la Estraro' kvankam sen voĉdonrajto kaj sen kosto al la Asocio. 'La Kolegio... estas konsultata de la prezidanto kaj de la Estraro en aparte gravaj cirkonstancoj'».

Do unuflanke nepre limigi la prezidantan mandaton «kontraŭ sklerozeco», kaj aliflanke kolegio de antaŭaj prezidantoj, kies baldaŭa prestiĝa influo certigos ian rutinan konservativismon: jen kio estas racia kohereco! Precipe por eviti estontece iun ajn deflanĝigon de la nun definitive stariĝanta politika linio!

—oOo—

Kaj por fini per malpli serioza demando, ni relegu la konkludan punkton de Jürgen Hamann kaj Boleslaw Staszczak, la du raportantoj de la Komisiono pri Statuto, kies tria lasta ano estas Humphrey Tonkin mem.

«Leviĝis unu ĝenerala gramatika propono pri la teksto de la Statuto. Du opiniantoj esprimis sin kontraŭ la uzo de 'li' kiel persona pronomo por prezidanto, ĝenerala sekretario ktp. (S-ino Chaldecott, s-ro Hagemann). S-roj Hamann kaj Staszczak opinias la pronomon 'ĝi' tute taŭga ĉi-rilate.»

Sen komento! Tiel «la renovigo de la Statuto de UEA tre bone antaŭenmarŝas, kiel skribas en la sekvanta artikolo Tonkin mem... La projekto celas plurrilate simpligi la ekzistantan tekston... Kaj ni ne mencias plu en la Statuto plurajn aferojn, kiujn ni intencas transigi al la regularo. Ni antaŭvidas ellaboron de regularoj por kovri artikolojn 15 kaj 16 de la projekto (Kunlaboro kun Aliaj Asocioj)...» Ja regularoj estas pli facile modifeblaj de la Komitato; tiel la kunlaboro kun neŭtralaj asocioj povos esti difinita kiel manĝo laŭ la karto! Kaj ĉi-rilate ŝerca vortludo pri «regno» nenion aranĝas: pri la statuto-ŝanĝoj H. Tonkin plene respondecas!

Jean Thierry

ANKORAŬ PRI LA TRADUKARTO

Oni neniam devas diri: «Fonto, el via akvo mi ne trinkos!». En la unua parto de sia manifesto «Defendo kaj glorigado de la franca lingvo» (1549). Du Bellay donis al la 5a ĉapitro la titolon: «Oni ne traduku poetojn»; nu, tri jarojn poste, li mem publikigis «La Kvaran Libron de Eneado, tradukitan per francaj versoj».

En 1619, juna kritikisto, Jean Chapelain, kiu baldaŭ akiris grandan famon (poste detruitan per la satirado de Boileau), skribis fiere: «Traduki estas io malnobla kaj la tradukado lasas supozi ĉe tiuj, kiuj ĝin praktikas, trivialecon de la koro kaj servutecon de la spirito». Sed li, samjare, aperigis francan tradukon de la hispana romano «Guzmán de Alfarache». Tiel malfacile estas, kiam oni ekadmiris unu pecon, ne senti la deziron dividi kun aliaj sian admiron!

Tio estas probable la kaŭzo, kial, post mia longa fortostreĉo super la P.I.V., mi turnis min al la esperantigado de francaj poemoj; mi tradukis «La Trofeojn» de Heredia en 1974, kaj en 1975-1976 antologion de miaj preferataj poetoj, el kiu mi publikigis du eliraĵojn en 1976: «La Himeroj» de G. de Nerval kaj «La Renesanca Periodo». Tia ekzerĉo estis por mi la okazo denove pripensi la problemojn de la tradukado. Tiuj, kiuj tuŝas la principojn mem, W. Auld klare kaj sagace pritraktis en siaj du eseoj: «La internacia lingvo kiel belarta tradukilo» (en la «Memorlibro pri la Zamenhofa jaro») kaj «Pri la tradukado de poezio» (en «Heroldo» 1964); mi mem pli atentis la praktikajn malfacilojn aŭ danĝerojn en ĉiu volumo de miaj Eseoj («Pri Beletro» I, 5; «Lingvo kaj Vivo» III, 1; «Ni kaj Ĝi» I, 19); kaj la konsiloj, kiujn mi tie donis (precipe la unua, ke oni povosciu la deiran lingvon) estus povintaj helpi al kelkaj tradukintoj, se nur tiuj estus ilin legintaj; ĉu citi kelkajn ekzemplojn? En tre serioza revuo la titolo «Some notes on Anatolian Ossetic» (t.e. «Kelkaj notoj pri la Anatolia oseta lingvo») fariĝis «Iuj rimarkoj pri Anatola ostejo». En franca gazeto la titolo «Rosemary' 'Baby' ou l'antiverbe fait chair» alivestiĝis en «Infaneto de Rozmaria aŭ la antivorto iĝinta katedro», stranga metamorfozo de la ĝusta «La bebo de Roza-Maria, aŭ la enkarniĝinta anti-Parolo». Ĉu ne Rossetti mem preteratentis mian averton pri la etimologia signifo de «gentle» en kelkaj lokoj de Sekspiro, lasante nian grandan Kalocsay kulpi jenan miskomprenon («La Tempesto», p. 28):

Ne juĝu tro subite, ja li estas
Milda kaj sendanĝera...

— ŝajne ia eksterordinara konsilo al Prospero, kiun minacas per nuda glavo furioza junulo! Feliĉe, Sekspiro vortigis ĝin pli prudente:

Ne risku lin provoki, ĉar li estas
Nobela kaj sentima!

Nur la ĉiam akrevida Banham notis tiun mispaŝon en sia recenzo («The Australian Esperantist», Okt. 1971).

Ripeti neaŭskultatajn admonojn estus senutile; mi prefere direktu mian hodiaŭan babiladon al la eta grupo de la poezi-amatoroj, kaj montru al ili mian manieron ataki la problemojn, kiujn elmetas la rimoj, la cezuroj, la aranĝo de la akcentoj kaj la harmonia dispozicio de la vortoj en la kadro de antaŭdifinita skemo. Mi ja scias, ke tiajn problemojn multaj modernismanoj rigardas kiel antikvajn gurdajojn kaj forpasintajn lunojn: «ridinde akademika poëtiko», ili verdiktas. Nu, tiel estu; aliajn poëtikojn mi ne ignoras, sed ne sukcesis asimili. Por mi, unu bela verso estas tiu, kiu mem kristaliĝas en la memoron, kaj mia spirito tiel bedaŭrinde funkcias, ke ĝi ne kapablas parkerigi tiujn seriojn da neegalaj linioj, kiujn hodiaŭ oni nomas versoj!

Verŝajne ankaŭ al senmotiva fiereco oni atribuos jenan konfidon; tian fierecon mi ja ne konscias (pri la senkonscia, kiu scias?) sed plie la deziron esti iel utila al kelkaj fervoraj vers-amantoj, kiuj scivolos pri la «sekretoj de la metio», kaj volonte provus mem lertigi sian manon super la rezistanta materialo.

Du ekzemplojn mi elektis, kiuj klarigos iom la aferon, kvankam sub malsama lumo. Temas unue pri unu soneto el «La Trofeoj», kies originaj cirkonstancoj estas senmisteraj: en 1880 Heredia iris ĝui kuracadon en la banurbo Pirenea Bagnères de Luchon (hodiaŭ mallongigita al Luchon), kies sulfurakvaj fontoj altiris la reŭmatismulojn. Tie, eble en la muzeo, li rimarkis romi-epokan altaron, sur kiu estis ĉizitaj unu dediĉo «Al la respektindaj Nimfoj» kaj la bildoj de du kultiloj, *patera* (neprofunda kaliko) kaj *libatorium* (bekhava vazo), ambaŭ uzitaj por la libacioj, tiuj verŝoferoj de gutoj el trinkaĵo honore al la dioj. Lia fantazio aproksimigis la antikvan riton al la ĉiutaga gesto de la kamparanoj, kiuj, trinkinte el fonto, forskuas el sia mano la tie restantajn akvogutojn. De tia imagaĵo venis jena elvoko, kies pitoresko ne malhavas poeziecon kaj melankolion:

LA SOURCE

NYMPHIS AUG. SACRUM

L'autel gît sous la ronce et l'herbe enseveli;
Et la source sans nom qui goutte à goutte tombe
D'un son plaintif emplit la solitaire combe.
C'est la Nymphe qui pleure un éternel oubli.
L'inutile miroir que ne ride aucun pli
A peine est effleuré par un vol de colombe
Et la lune parfois, qui du ciel noir surplombe,
Seule, y reflète encore un visage pâli.
De loin en loin, un pâtre errant s'y désaltère
Il boit, et sur la dalle antique du chemin
Verse un peu d'eau resté dans le creux de sa main.
Il a fait, malgré lui, le geste héréditaire,
Et ses yeux n'ont pas vu sur le cippe romain
Le vase libatoire auprès de la patère.

Kio donus, laŭvorte tradukite:

LA FONTO

La altaro kuŝas sub la dornoj kaj la herbo, superkovrite;
Kaj la sennoma fonto, kiu guto post guto falas,
Per sono plenda plenigas la solecan valkruton.
Ĝi estas la Nimfo, kiu priploras eternan forgeson.
La senutila spegulo, kiun nenia sulketo faltas,
Estas apenaŭ tuŝetita de kolomba flugo
Kaj la luno, iafoje, kiu el ĉielo nigra superstaras,
Sola, ankoraŭ reflektas tie vizaĝon paligintan.
De temp' al tempo, migra paŝtisto tie sensoifigas sin.
Li trinkas, kaj sur la slabon antikvan de la vojo
Verŝas iom da akvo restinta en la kavoj de lia mano.
Li faris, malgraŭ si, la heredan geston,
Kaj liaj okuloj ne vidis sur la cipo romana
La vazon libacian apud la patero.

Oni nun povas vidi, kiaj estas la malfaciloj: unue la du tercetoj prezentas nur du rimojn anstataŭ la ordinrajn tri (kvankam la aranĝo *abb aba* ne estas la plej harmonia); due, neniu versfino liveras esperantigeblan rimon, krom la duopo *mano/romana* (kies gramatikan kategorion oni tamen devos modifi). Estas do necese remodli ĉiun el la versoj, por trovi dufoje kvar rimojn kaj dufoje tri, kio, en nia lingvo estas aparte streĉa entrepreno, kaj fariĝas ebla nur, se oni koncedos la uzon de pli liberaj rimoj. Konvenas cetere konsideri, ke la poeto mem estis kelke ĝenata en sia rimserĉado kaj kondukata al elekto de ne tute ĝustaj terminoj: ne ja la fonto «falas», sed ties akvo; «surplombe» oni kutime diras nur pri objekto kies supro antaŭeniras pli ol ĝia bazo (ekz-e roko, balkono ktp). Oni do ne estu pli severa por la malfeliĉa tradukanto, ol la poeto estis por si mem.

Mi komencos per la lasta verso, ĉar en soneto ĝi estas plejofte la plej grava. La ritmo postulus ŝanĝi «apud» al «apude de», sed ĝenas la sinsekva «de de»; krome la franca verso prezentas apartan harmonion pro la agordo inter la finoj de ĉiu hemistiko «libatoire/patère»; kvankam tian oni ne povus trovi en Esperanto, oni povus serĉi ian ekvivalenton, ekz-e en la ripeto aliteracia de «l» kaj de «v/f»

La vazon libacian flanke de la patero

Se do ni konservas «patero» je la versfino, du vortoj en *-ero* venas tuj al la spirito en tiu kunteksto: *ofero* kaj *pavimero* kaj cetero ili, pro la lokigo de la respondaj ideoj en la frazo, donus la pli bonan rim-aranĝon *aba bab*. La dua rimo estas jam parte trudita de la teksto: *mana/romana* (kelkaj eble preferos skribi *Romana*, por eviti la konfuzon kun la literatura ĝenro...); por la tria rimo, oni tuj ekpensas pri la riĉa rimo *emana* («san-emana», ekz-e), sed la sinsekvo de la frazo tion ne permesas: evidente la paŝtisto trinkas el la fonto pro soifo, ne por kuracado! La sola solvo, kiun mi kapablis imagi, estas *lontana*, kiu konservus iom el la senco de «errant» (migra); sed *lontana* ne povas esti la paŝtisto mem, kaj tio devigas nin aldoni kroman substantivon (kuro, vago k.s.) kaj sekve foroferi ion el la origina verso: mi rimarkas, ke «se désaltère» et «il boit» estas preskaŭ sinonimaj, do...

De temp' al tempo tie paŝtist' en vag' lontana
Trinkas...

Sed tiu «trinkas» venas iom tro senprepare: mankas la ideo de la soifanta migranto; ĝin oni povus sugesti per helpa verbo, jene:

Neofte tien serĉas paŝtist' en vag' lontana
Trinki...

kun la aliteracio de konsonanto plus «t». La ceteraj versoj ne prezentas grandajn ĝe-
nojn: oni anstataŭigu «slabo» per «plato» (de pavimero), repuŝu al la verso 13a la verbon
«faris» (eble «refaris» estus pli bone) kaj forigu la sekvantan subjekton, ĉar ĝi estas neu-
tila: «per la okuloj ni vidas», instruis jam la Fundamento!

La du kvaroj kaŝas pli da dornoj. Evidente «falas» (v. 2a) kaj «valo» (v. 3a) povas
doni rimojn, al kiuj, en la dua kvaroj, oni trovus respondon per «alo» (anstataŭ «flugo»)
kaj «palo», se oni konsentos interŝanĝi la ordon de la versoj 7a kaj 8a. Sed pri la
eksteraj rimoj... La ordoŝanĝo de tiuj du versoj montras, ke oni povus meti verbojn ĉe
tiuj versfinoj («faltas... superkovras... priploras... superstaras...»), kio donus agrablan va-
riecon: sed kiel trovi kvar sinonimojn al tiuj verboj, kiuj rimigis inter si? «faltas» kaj
«altas» (...«kiu en la nigra ĉielo altas...») efikus bone, sed bedaŭrinde nenia alia vorto per
—*alt*— aŭ —*ald*— taŭgas por la unua kvaroj. Ni provu per la sencnajbara «sulk»: nenia
favora rimo, krom la rimoidoj per —*ult*—: «sepultas» kaj «plorsingultas» sin proponas,
sed ĉiam mankas la kvara rimo; cetere «plorsingultas» tre malbone aplikigis al la bruo
de gutanta fonto. La ĝusta vorto estus «plorĝemas», kio kondukas nin al al «subpremas»,
«tremas» kaj... kaj... mi vidas nur «gemas» (t. e. brili kiel gemo), laŭ la rememoro de
la Dante-a «eterna margarita», la eterna perlo. Jen do kiel skiziĝas la fina traduko:

LA FONTO

Sepulte la altaron dornoj kaj herb' subpremas;
Kaj la sennoma fonto kun sia gut-elfalo
Per plenda son' plenigas solecon de la valo.
Plore la Nimfo pri la forges' eterna ĝemas.
Vana ŝpegul', sur kiu nenia falto tremas!
Apenaŭ ĝin tuŝetas flug' de kolomba alo,
Kaj tie reflektiĝas nur la vizaĝa palo
De l' lun', se ĝi en alto nigraĉiele gemas.
Neofte tien serĉas paŝtist' en vag' lontana
Trinki, kaj sur l'antikvan platon de pavimero
Reston da akvo verŝas el sia kavo mana.
Senscie li la geston heredan de ofero
Refaris, ne vidante sur tiu cip' romana
La libacian vazon flanke de la patero.

Probable, aliaj, alispecaj interpretoj estus egale bonaj, kaj mi ne pretendas, ke la per-
fektan mi malkovris — sed ankaŭ ne tio estis mia celo.

La dua ekzemplo alportos eble pli detalan instruon. Ĝi estas la lasta strofo de unu
odo de Teofilo de Viau, franca poeto de la 17a jc. Tiu odo priskribas la matenan
vekiĝon de la kampara vivo, kaj finiĝas per jenaj kvar versoj, kiuj entenas la jam cent-
foje uzitan komparon inter virino kaj floroj, iom tamen renovigitan, ĉar ĝi prilumas
la freŝecon de ambaŭ (dum la fama odeto de Ronsardo elvokis la minacon de velkiĝo);
eble eĉ, en nia tempo de senĝenaj kaj senĝentilaj seksrilatoj, ĝi reakiras ian origina-
lecon — kvazaŭ mankiso aŭ reverenco...

Il est jour, levons-nous, Philis;
Allons à notre jardinage
Voir s'il est, comme ton visage,
Semé de roses et de lys.

Laŭvorta traduko:

Estas lume, ni leviĝu, Filisa,
Ni iru al nia ĝardeno
Vidi, ĉu ĝi estas, kiel via vizaĝo,
Ornamita de rozoj kaj lilioj.

(«Philis» estas poezia nomo de amatino — pruntita elde Vergilio aŭ Ovidio trans la his-
pana aŭ itala, kiuj simpligis la grekan ortografion «Phyllis»; «jardinage», hodiaŭ signi-
fas nur ĝardenkultivon, sed tiutempe ankaŭ la ĝardenon mem; «semé», propre *semita*,
de longe uzata anstataŭ «parsemé» t. e. (*dis*e) *ornamita*, aŭ, kiel uzis Zamenhof kaj Kabe,
punktita; sed tiu vorto estus ĉi tie malkonvena pro la metafora aludo al vizaĝo, kie
punktoj estus nur makuletoj; fine «roses et lys» estas la tradiciaj esprimoj de la diver-
saj delikataj haŭtuancoj de virina karno.)

Al la francaj oksilabaj versoj normale respondas en nia lingvo la kvarjambaj (o-/o-/
o-/o-/o), kun la eventuala, polmaniera anstataŭo de triamfibrako (t. e. o-o/o-o/o-o), kiu
konservas la sama nombron da silaboj, sed foroferas unu akcenton.

La malfacilo kuŝas precipe en tio, ke la simpla traduko de la teksto ne liveras rimojn, kaj ke la libereco ilin akiri aliformante la frazon estas malvaste limigita de la mallongeco de tiuj versoj; la ringa aranĝo de la rimoj (abba) ankaŭ ne faciligas la solvojn.

Unuapaŝe ŝajnas konservinda la kvara verso, ĉar sur tiuj flornomoj ripozas la tuta galanteco de la strofo: la ĝardeno estas «semita» per rozoj kaj lilioj, same kiel la vizaĝo de la amatino, metafore. Sed, se la rimoj al «lilioj» estas multegaj, malmultegaj adaptiĝus senĝene al la frazo kaj al la ritmo; nur unu mi trovis: *radioj*. Ĉe la du sekvantaj versoj la rimoj *ĝardeno nia/vizaĝo via* prezentus sin mem, se ilia banaleco ne forpelus ilin el ĉia, iom prizorgata poemo; kaj la seninversia grupo «nia ĝardeno» estas malfacile uzebla je la versfino, pro la ĥorjamba skemo (—oo—); al *ĝardeno* bone rimigiĝus *mateno*, sed devas rimigi ne la 1a kaj 2a versoj! Alia rimo estus *pleno* (da rozoj ktp), sed tiu vorto ŝajnas iom senpoezia. Tamen, se oni elizius '*ĝarden'*', oni povus uzi kiel rimon *jen*, kiu kvazaŭ geste montrus al ambaŭ belaj spektakloj. Fine la du frazeroj *ni iru* kaj *estas ornamita* ne trovas liberan spacon en tiaj versoj; por la unua mi konsideris, ke la cel-adjekto *vidi* post *leviĝu* supozigas mem la movon; por la dua, el la eblaj proksimsencaj verboj: *plenas, brilas, lindas*, mi elektis la lastan, pro la delikateco de la ideo kaj de la sono (aliteracio kun *lilioj*). Oni do ricevus, kiel tradukon unuan:

Leviĝu ni je l' sunradioj,
Filisa, vidi, ĉu l' ĝarden',
Kiel vizaĝo via, jen
Lindas de rozoj kaj lilioj.

Dua ebla solvo estus inversigi la ordon de la flornomoj: sed el la malmultaj rimoj al *rozoj* apenaŭ taŭgos *ripozo*, al kiu oni devus trudi nekutiman pluralecon (vere, ke ili estas du...); por kompensi tiun malfidelaĵon, per kiu la leviĝo fariĝas ripozĉeso, oni povus provi konservi *vizaĝon* je la versfino; sed okazas ritma problemo: *via vizaĝo*, kiel mi jam notis, ne estas toleribla, krom se oni faros el *via* enklitikon, t. e. se oni tre malfortigas ĝian akcenton per la antaŭmeto de forte akcentita silabo, ekz-e de eliziita vorto. Mi tiel ekpensis i.a. «*en ver'*», kiu amuze plilumigas la galantan aludon kaj faras aliteracion trioblan de *v*. En la unua verso, la koncizo devigas uzi la formon *Filis*, kiu al fremda leganto ne tuj elvokus la ideon de virina nomo. Kaj la lasta verso, en tiuj kondiĉoj, povos ricevi la formon nur de licenca triamfibraka verso: ni indulge pledu, ke tiu ŝanĝo de ritmo donas ian reliefon al la konkludo. Ni skribu do, kiel tradukon duan:

Filis, tagiĝis: for ripozoj!
Ni vidu, ĉu l' ĝardenpejzaĝon,
Kiel en ver' vian vizaĝon,
Ornamas lilioj kaj rozoj.

Tria rimedo por konservi la nomflorojn je la rimo estas uzi ilin adjektive; tiele, al *lilia* bone eĥus virinnomo, kaj ni povus riski la varianton *Filia*, kiu havas respondon en la greka nomo *Philia*; kaj aŭdaca uzo de neologisma interjekcio lasos al ni lokon, por insisti pri la *nia* (ĝardeno), kiu komprenigas, en la franca, ke la juna paro kultivas mem siajn florojn; por tion aludi, ni disponas precipe *fleg* kaj *vart*; la unua ne liveras taŭgan rimvorton; al la dua, oni povas respondi per la verbigo de la radiko *art*, kun la nekutima, sed tute normala senco «*arte impresi*». Tiele la traduko n-ro tria:

Sor! Tagas! Vidu ni, Filia,
Ĉu la ĝarden', kiun ni vartas,
Kiel vizaĝo via, artas
Per belaj rozaj kaj lilia.

Elturniĝi oni povus ankaŭ, se oni konsentus meti la flornomojn ne ĉe la rimo, sed en la komenco de la verso; tiam oni finus la verson per verbo: en tiaj kondiĉoj ni povus uzi la jam duonviditan paron *matenas/plenas*. Kaj por la interna, meza rimparo, kial ne helpi nin per vira rimo? Kio donus jenan varianton kvaran:

Filis, ekstaru ni: matenas!
Ni vidu, ĉu l' ĝardeno jam
Kiel via vizaĝo, Am'!
Je rozoj kaj lilioj plen.

Evidente, ĉi tiu lasta verbo sonas... iom malplene, kaj, kontraste, la alvoko ĉe la tria verso ŝajnas iom tro emfaza. Ni serĉu. Se oni ŝovus «*via*» je la rimo de la tria verso, oni ekpensas tuj pri *envia*, kiu estigus specon de belkonkurencio inter la natura kaj la vivanta. Proponiĝas tiam nia provo kvina:

Leviĝu ni, Filis — jam helas! —
Kaj vidu, ĉu l' ĝarden' envia —
Rivali kun vizaĝo via
Per rozoj kaj lilioj celas.

Denove, abstrakta verbo ĉe la fino de la strofo ne kontentigas min; en ĉi tiu kulmina punkto de la odo devus esprimiĝi la plezuro de rigardo al belaĵoj; oni tiamaniere estus alkondukita al *ravas* aŭ *ĉarmas*. La unua ne liveras multajn rim-eblojn; unu tamen estas interesa metaforo: ĉu la suno, eletendante siajn radiojn, ne kompareblus al la disetendita vosto de pavo? La komparon, kiun ni ĝis nun esprimis per *kiel*, oni povus ankaŭ esprimi per adverbo: *simile* kun la kunrimo *brile*. Sed por konservi al la tria verso la jamban ritmon, estas necese aldoni unu silabon en la sinsekvo *al via? vizaĝo*; la kunmeto *florvizaĝo*, kvankam iom precioza, alproksimigas la du terminojn de la komparo (oni cetere povus ankaŭ pensi pri *junvizaĝo*, t. e. vizaĝo de juneco), kaj oni tiel atingus la sesan eblajon:

Filis, ni staru: sun' jam pavas.
Ni vidu, ĉu l' ĝarden', simile
Al via florvizaĝo, brile
Per rozoj kaj lilioj ravas.

Se tamen la metaforo de la unua verso kaj la kunmetaĵo de la tria ne plaĉus, oni povus reveni al *ĉarmas* (kun la parrimo *varmas*) kaj al la amfibraka formo por la tria verso, ekzemple:

Filis, ni staru — tag' jam varmas —
Kaj vidu, ĉu l' ĝarden', simile
Al via vizaĝo, ekbrile
De rozoj kaj lilioj ĉarmas.

Kaj ĉe tiu sepa varianto ĉesas mia esplorado; Dio mem ne iris trans ses! Ĉiu el tiuj sep havas siajn bonajn kaj siajn malbonajn punktojn; mi lasu al la leganto la elekton, se nur li ne jam endormiĝis antaŭ tiom da teknikaj detaloj. Sed mia intenco estis montri, ke nia lingvo disponas multe pli da rimedoj en sia vortaro, rimkolekto kaj versfarado por ebligi fidelan tradukon, ol oni ordinare suspektas; kaj tion oni povis fari nur per analizo de la ecoj, sonoro, dimensio, elvokiveco ktp, de la unuopaj vortoj kaj provado de iliaj interarangoj. Kiel skribis Vincento Van Gogh: «Mi preferas elpensi, kiamaniere brakoj, kruroj kaj kapo estas alkroĉitaj al trunko, ol demandi min, ĉu mi estas aŭ ne, pli aŭ malpli, artisto».

G. Waringhien

¹ Tiel inverse funkcias la spirito de la modernistaroj, ke, eĉ kiam en liberritma poemo ili renkontas sinksekon de regulaj kaj rimitaj versoj, ili tion ne rekonas kaj prozkadence tradukas (vd ekz-e la finon de «Zone» de Apollinaire, p. 46 de «Vojo kaj Vorto» de R. Passos Nogueira).

18-aj INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Sub la supra titolo ĵus aperis tre interesa libreto. Kiel indikas ĝia titolo, la verko temas pri la 18-aj Internaciaj Floraj Ludoj okazintaj pasintjare en Tortosa (Tarragona).

Eldonis ĝin, la Eldona Fakto de H.E.F., 80 paĝoj, formato 18 × 11,5 cm., broŝurita. Prezo: 200 pesetoj, plus sendokostoj.

Havebla ĉe Eldona Fakto de H.E.F. Inés Gastón, P.º Marina Moreno, 35, 4.º dcha. Zaragoza-1, Hispanujo, aŭ ĉe via Libroservo.

Libroservoj ricevos 25 % da rabato. Minimuma mendo 10 ekzempleroj.

MALLONGE

De la 28-a ĝis la 30-a de septembro 1979, okazos en Graz (Aŭstrujo) la 20-a Trilanda Konferenco de Aŭstrujo, Italujo kaj Jugoslavio.

Informojn kaj aliĝilojn oni povas peti al jena adreso: Esperanto-Societo «Unueco», Eggenberger Gürtel 32, A-8020 Graz (Aŭstrujo).

La filatela Sekcio de la Helena Esperanto-Asocio intencas organizi internacian filatelan «ludon» inter la filatela Esperantistaro de la tuta mondo.

Informas: Filatela Sekcio de H.E.A., S-ro Alekos Fragias, Figalias 5, Nea Kifisia Ateno (Greklando).

«Le Rotarien» franca rotaria revuo. Tiu ĉi grava revuo, en ĝia numero 316, majo 1979, Lyon, enhavas dudek-paĝan kajeron dediĉitan al Esperanto, la Internacia Lingvo por internacia interkompreniĝo. Ciuj artikoloj estas ja interesaj kaj bone ilustritaj. Imitinda ekzemplo!

BELETRO

Dorota Zieminska /1937 —/

DIDASKALIO* AL LA SESA AKTO

Tiel aŭ alimaniere vi devis pereji Hamleto
vi ne estis destinita por la vivo
Zbigniew Herbert — «La funebra
kanto de Fortinbraso»

en ĉi la plej bona el la mondoj
sur kiu ekzistas tiom da aferoj
pri kiuj ne sonĝas eĉ la filozofoj
Joriko ironias la sencon de laŭvorteco
ĉevalo aperas post la regnoekzisto
Ofelia balzamas virtojn en malklara profundaĵo
spireganta Gertruda trote
spuras la malgravecon de sia virtdevio
sorĉistinoj kiel la homoj sukcese forlogas
kaj nur la spiritoj noble persistas ĉe la digno
kaj mortigita per vivo la amo de Julia kaj Romeo
en ĉi la plej bona el la mondoj
pri kies tiom da vero oni eĉ ne sonĝas
Klaŭdio ĝis kia grado la penetremo de
Hamleto helpas iri kontraŭ
la morto de paragrafoj atrofio de konscioj
dissternas la kampon
por triumfigi la tranĉojn de Fortinbraso?
kaj se ni valorigas ĉion ĉi — diru —
ĉu rajtas ŝoki la orelojn
tiu ĉi decidomanko
ĉu absoluta sentemo kaj
pensoabomeno al murdo
kiuj elbatante la klingon
malfruigas la venkon super malbono?
ĉu ekzistas la homo ĉi metronomo pli perfekta
ol la pendolo sentiva por nedecidemo?
kia absoluto konserviĝos ĉi tie
je lia kulpo ke li ne estas destinita por la vivo?
de kiam kaj ĝis kiam ni admiras
la bravan mankon de la kompromiso
NENIO kaj NENIU malpacigas
sensaciĉasistojn
korteganojn pri lertaj intrigoj
estetikulojn pri monujo
al kiuj
orbrilo — beleco
silento — oro kaj
silento trafas rekte en la celtabulon
kiam ili eniras inter kornikojn kaj fiore grakas
HAMLETO NE eniras
meditas elektas flanke staras
tiel kuraĝa ke li ne perceptas silenton en maljustaĵo
Kasandraokule li klarvidas malbonon
pesante egale temperamenton de l'virto kaj delikto
tial estas Horacio kaj estas vi Klaŭdio

puno devas esti

laŭmezure de l'avidio

laŭmezure de l'avidio

falas kronito mizere reĝe

kvankam tiom da vortoj falis ho Klaŭdio

restas

ĈU ESTI AŬ NE ESTI HAMLETO

morti oni povas eĉ post la senvivigo de la frato filo leĝo

/kaj Romanoj juĝis — dura lex sed lex/

El la pola tradukis:

Jan Smykalski

* *didaskalio* /greka *didaskalia*/, flanka dramteksto, rimarkoj, klarigoj de la aŭtoro kiamaniere oni devas prezenti teatraĵon.

Mieczyslaw Jasek
instruisto-psikologo

El la ciklo: «Pejzaĝo por violono»
Swidnica Śl., Pollando,
1971

x x x

Trist' en
mont'-tuber'
mem sin anoncidas
per steloj de l' val'
per akso-tranĉil'
de l' tagiĝ'
per veluro de l' nokt'
post sepa malĝoj'
post sepa river'
per sulko de l' memor'
PANJO

El la pola tradukis:

Jan Smykalski

Puah Salev-Toren
nuntempa poetino

KORPORDEGOJ

Matene mi vidis vagulon,
Pri almozo li petis ĉe domeniĝoj,
Sed estis la pordoj por li ŝlosfermitaj.
Vespere mi aŭdis pepvoĉon de bird' en ĝardeno,
Per bek' alfrapadis ĝi trunkon de arb',
Kaj ne estis respondo.

Sed mi venis ne por elpeti kaj nek por ricevi.
Mi softe perfingre frapetis surporden,
Kaj antaŭ mi disovriĝis pordegoj de koroj.

Ne venis mi ion forpreni,
Kaj tamen mi ĉion ricevis.
Ricevis mi koron de vi kaj kun ĝi l' universon.

En mond' vidas mi ĉiutage
Vagulon petante almozon,
Sed ĉiu pord' por li estas fermita.
Kaj birdo frapadas ankoraŭ senespereble
Sur trunkon de l' arb' en ĝardeno,
Sed restas l' alvok' sen respondo.

Elhebregis: Josef Kohen-Cedek

ĈU VI KONSENTAS?

—Dek.

—Nu! Mi ne tiom petas.

—Dek-unu.

—Nu! Vi estas tre ĝentila.

—Dankon!

—Vi estas tre bonkora.

—Dankon!

—Mi estas tiu, vere, kiu devas vin danki: dankegon, he!

—Dek-du.

—Vi estas sanktulo.

—Ĉu vi estas kontenta?

—Ho, jes!

—Etendu viajn manojn, mi petas.

—Jes, jes.

—Jen, prenu!

Li donas al li ok.

—Dankon, dankon! Tamen, kie estas la restaĵo?

—Bonvolu redoni al mi unu el tiuj, kiujn mi donis al vi.

—Bone —li tion faras—. —Sed...

—Ĉi kiom da ili vi havas nun?

—Sep.

—Ĉu vi estas kontenta?

—Jes; ĉar mi petis al vi, ĝuste, sep.

—Laŭ mi, sep estas troo. Ĉu ne

—Jes; vi estas prava. Tial mi estas tre dankema pro tio ke vi ilin donis al mi.

—Morgaŭ mi donos al vi la ceterajn.

—Koran dankon; sed nur kvin vi devas doni al mi, dirinte ke vi donus al mi dek-du.

—Ĉu mi promesis pri dek-du?

—Jes.

—Kiom da ili vi havas nun?

—Sep.

—Do, tial, donu al mi unu el la sep kiun mi liveris al vi, mi petas; ĉar pro tio ke morgaŭ mi donos al vi sep, estas klare ke al vi malmankas unu. Ĉu vi konsentas?

—Bone.

Li redonas unu.

—Kiom da ili, do, nun vi posedas?

—Ses.

—Kaj kun la pliaj ses kiujn mi donos al vi morgaŭ, jen la dek-du promesitaj. Ĉu vi estas kontenta?

—Jes.

—Kion vi faros, nun, kun la ses?

—Provizore mi gardos tri, kaj la ceterajn tri...

—Donu al mi tiujn tri; mi ilin gardos por vi.

—Dankon.

Li donas al li tri.

—Kiom da ili vi havas nun?

—Tri.

—Kion vi faros kun ili?

—Mi urĝe bezonas ilin por...

—Kiom da ili mi krome donos al vi, koncerne tiujn, kiujn vi petis al mi?

—Kvin; ĉar mi petis al vi sep, kaj vi promesis doni al mi dek-du entute.

—Ĉu vi nur bezonas sep?

—Jes; sep, tiam, estus ja por mi sufiĉa nombro.

—Do, donu al mi tiujn kvin kiuj troas. Mi ilin redonos kiam vi havos pli da bezono ol nun pri ili.

—Mi nur havas tri.

—Donu ilin al mi.

Li ilin donas al li.

—Vi ŝuldas al mi du. Ĉu vi konsentas?

Amschel PAZ
Tradukis el la hispana:
G. Mora i Arana

FABELO PRI MALAPERINTA PRINCINO

de Rabi Naĥman el Braclav

Antaŭrimarko: Ni prezentas ĉi tie la unuan el la 13 fabeloj de Rabi Naĥman. Ĝi baziĝas sur la koncepto: «*Seĥina ba=Galut*» (hebree: *La Dieco en la ekzilo*). «*Seĥina*» estas alia nomo de la Dieco, signifas proksimume: «*Rebrilo de la Dia Majesto*», aŭ: «*La Dia Ceestado*». Ĝi reprezentas — se eblas diri tion — la inan esencon de la Dieco: indulgo, kompato, multpacienco kaj favorkoreco. Laŭ talmuda tradicio, tiu Seĥina akompanas la fidelan komunumon de la ekzilitoj, funebras kun ili, kaj atendas — kune kun ili — la finan liberigon.

La sekvanta fabelo havas simbolan signifon: la malaperinta princino estas simbolo de la juda nacio, kaptita kaj forigita el ĝia lando; la eminentulo — simbolo de Seĥina.

En tiu lumo oni devas kompreni la enkondukajn vortojn de Rabi Naĥman: «*Ce tiuj, kiuj aŭdis la fabelon, ekvekiĝis pento-deziro*» — pentado estas antaŭkondiĉo por eliriĝi la popolon el la ekzilo.

Pli detale (iom modifite) solvas tion la usona juda verkisto Meyer Levin en sia «*Classic Hassidic Tales*»: La reĝo (Dio) senintence sendas sian amatan filinon (La Seĥina) en la lokon de la diablo (nia mondo). Poste li afliktiĝas pro ŝia malapero, kaj unu el la eminentuloj (Izrael, la Mesio) iras for por serĉi la princinon. Du fojojn li ŝin renkontas, sed ne sukcesas liberigi ŝin. Du fojojn li atendas en la dezerto (ekzilo de Egiptujo kaj Babilono). Trian fojon li vagadas en la mondo (la nuna ekzilo), fine li retrovas ŝin en kastelo el perloj sur ora monto (la Sankta Lando). Tie li restas, ĝis ili sukcesas iri returne al la reĝo.

N. Z. M.

La Majstro ekparolis kaj diris:

Survoje mi rakontis fabelon
kaj ĉe tiuj, kiuj ĝin
aŭdis, ekvekiĝis
pento-deziro.

Jen ĝi
estas.

Estis iam reĝo. Tiu reĝo havis ses filojn kaj unu filinon. La filinon li korfavoris. Li ege amis ŝin kaj ĉiam traktadis kiel karan infanon.

Iufoje, en certa tago, ili estis kune. Kaj okazis, ke li ekkoleris kaj el lia buŝo eliĝis la diro: «*La diablo vin prenu!*» Nokte ŝi eniris en sian ĉambron, kaj matene oni ne sciis, kie ŝi estas.

La reĝo treege afliktiĝis. Altranga eminentulo, la dua post la reĝo — vidante la aflikton de la reganto — ekstaris kaj petis, ke oni donu al li servantojn kun ĉevaloj, kaj monon por elspezoj, kaj li foriris serĉi la filinon. Longe, tre longe li serĉadis, ĝis li ŝin trovis.

Kaj nun ni rakontu, kiel li serĉadis, ĝis li fine trovis ŝin.

Li unue iris tra loĝataj regionoj, unuflanken kaj aliflanken. Poste li travagis dezertojn, kampojn kaj arbarojn, serĉante longan tempon.

Iam, irante en la dezerto, li ekvidis flankan vojeton. Kaj li pensis: Tiom longe ni jam vagadas en la dezerto kaj ne povas trovi ŝin, mi do iru laŭ tiu vojo, eble mi atingos lokon loĝatan. Longan tempon li iris. Fine li vidis kastelon. Ĉirkaŭ tiu staris multe da soldatoj. Ĝi estis tre bela kaj la soldatoj bonorde ĉirkaŭis ĝin.

Li ektimis, ke la soldatoj ne lasos lin eniri. Tamen li diris al si: mi provu. Li restigis la ĉevalon kaj aliris la kastelon. Oni ne haltigis lin. De unu ĉambro al

alia li marŝis kaj neniu lin detenis.

Li plu iris kaj venis al palaco. Li ekvidis la reĝon sidanta tie, la krono sur lia kapo, kaj svarmo da soldatoj ĉirkaŭstaras kaj ludas sur instrumentoj. Estis gaje kaj amuze. Nek la reĝo, nek unu el tiu svarmo atentis lin. Kaj li vidis bongustajn manĝaĵojn, aliris kaj manĝis.

Poste li kuŝiĝis en angulon por vidi, kio okazos. Li aŭskultis: la reĝo ordonis, ke oni alkonduku la reĝinon. Kelkaj iris por venigi ŝin. Iom poste aŭdiĝis tumulto kaj ĝojado: grandnombro da muzikistoj kaj kantistoj ekludis kaj kantis, ĉar oni alkondukis la reĝinon. Oni starigis por ŝi tronon kaj lokis ŝin apud la reĝo.

Tio estis la princino. Li, la eminentulo rigardis kaj rekonis ŝin. Poste rigardis la reĝino kaj vidis viron kuŝantan en la angulo: ŝi rekonis lin.

Ŝi malsupreniris de sia trono, aliris, tuŝis lin kaj demandis:

—Ĉu vi konas min?

Li respondis:

—Jes, mi konas vin. Vi estas la princino, kiu malaperis. Kaj li demandis, kiel ŝi ĉi tien venis. Diris ŝi:

—Car el la buŝo de paĉjo eliĝis la diro: «*La diablo vin prenu!*» kaj jen estas la loko okupata de li.

Tiam rakontis la eminentulo, kiel forte la patro afliktiĝis kaj jam kelke da jaroj li, la eminentulo, serĉadas. Kaj li demandis: «*Kiel mi povas forliberigi vin?*».

Respondis la princino:

—Vi ne povas forliberigi min krom nur se vi elektos iun lokon kaj restos tie unu jaron. Dum la tuta jaro sopiru pri mia liberigo. Kaj kiam vi havos tempon, okupu vin je via deziro kaj esperu, ke vi min liberigos. En la lasta tago detenu vin, ke

vi ne manĝu kaj ne dormu dum tutaj 24 horoj.

Li tiel faris. Kiam la jaro forpasis, en la lasta tago, li ne manĝis kaj ne dormis. Li levigis kaj iris for, al la princino, por liberigi ŝin. Flanke ĉe la vojo li vidis arbon, sur kiu belegaj pomoj kreskis. Kaj li deziris manĝi iom de ili.

Tuj kiam li manĝis unu pomon, li falis teren kaj ekdormis. Longe, tre longe li dormis tie. La servanto klopodis maldormigi lin, sed ne povis.

Fine li ekvekiĝis kaj demandis:

—Kie mi estas?

La servanto rakontis al li, kio okazis. Li diris: «Vi dormis tre longan tempon. Kelke da jaroj vi dormis: dume mi nutris min per la fruktoj».

La eminentulo treege ĉagreniĝis. Li foriris kaj renkontis la princinon. Ŝi plendis antaŭ li kaj forte ekscitiĝis:

—Pro nur unu tago vi perdis la ŝancon. Ĉar vi ne povis deteni vin de manĝado, la bonŝanco forflugis. Se vi estus veninta en tiu sama tago, vi elirigus min. Sed vere, rezisti la inklino al manĝado estas tre malfacile, precipe en la lasta tago: tiam la impulso estas pli forta. Tial de nove elektu difinitan lokon kaj restu tie ankoraŭ alian jaron. En la lasta tago vi nun povas manĝi, sed tute ne dormi. Kaj vinon ne trinku, por ne endormiĝi. Grave estas — ne dormi.

Li tiel faris. La lastan tagon li iris al ŝi. Survoje li vidis fonton fluantan. Tiu fonto estis ruĝa, kaj ĝia odoro kiel odoro de vino. Demandis li la servanton:

—Ĉu vi vidas? Jen estas fonto. Ĝi devus enhavi akvon, sed ĝi estas ruĝa, kaj la odoro kiel odoro de vino.

Li gustumis iomete de la fonto. Tuj li falis teren kaj dormis tre longan tempon — 70 jarojn.

Tun tagon pretermarŝis multego da soldatoj. La servanto kaŝiĝis de ili.

Poste venis kaleŝo. En tiu kaleŝo sidis la princino. Ŝi haltis tie, malsupreniris, sidigis apude kaj lin rekonis. Ŝi klopodis vekti lin, sed li ne maldormiĝis. Kaj ŝi forte lamentadis:

—Tiom longe vi vin turmentas kaj penas liberigi min; kaj pro nur unu tago, en kiu vi povis min elirigi, vi ĉion perdis.

Ŝi malĝojis kaj ekploris. Poste ŝi diris:

—Grandan kompaton mi sentas al vi kaj al mi. Tiom longe mi estas ĉi tie kaj ne povas eliri.

Ŝi prenis la ŝalon de sur la kapo, surskribis ion per larmoj kaj metis ĝin apud li. Poste ŝi levigis, supreniris la kaleŝon kaj forveturis.

Fine li maldormiĝis. Demandis li la servanton:

—Kie mi estas?

Tiu rakontis al li, kio okazis: ke multego da soldatoj pretermarŝis, ke estis tie

la kaleŝo kaj la princino priploris lin kaj ekkriis: «Grandan kompaton mi sentas al vi kaj al mi».

Dume li rimarkis, ke iu ŝalo kuŝas ĉe li. Li demandis: «De kie ĝi estas?».

Respondis la servanto: «Ŝi restigis ĝin kaj surskribis ion per larmoj».

Li prenis la ŝalon, levis ĝin antaŭ la suno, ekvidis la literojn kaj tralegis la skribon: ŝiaj plendoj kaj ekkrioj.

Tie estis ankaŭ dirite, ke ŝi jam ne troviĝas en la sama palaco. Li devas serĉi oran monton kun kastelo el perloj. «Tie vi trovos min».

Li restigis la servanton kaj iris for por serĉi ŝin. Kelkajn jarojn li vagadis kaj serĉadis. Li pripensis: en loĝataj regionoj ne troviĝas ora monto kun kastelo el perloj — ĉar li komprenis geografiajn kartojn — mi iros en dezertojn kaj serĉos tie.

Li do travagis dezertojn, serĉante kelkajn jarojn. Fine li ekvidis altkreskan viron, kies staturo ne estas laŭ ordinara mezuroj. Li portis grandegan arbon, kian oni ne trovas en loĝataj regionoj. Tiu demandis lin: «Kiu vi estas?».

Li respondis:

—Mi estas homo.

Ekmiris la grandegulo:

—Mi loĝas en la dezerto tre longan tempon kaj neniam vidis ĉi tie homon.

La eminentulo sciigis lin pri sia afero: ke li serĉas nun oran monton kun kastelo el perloj. Diris la grandegulo:

—Ĝi tute ne ekzistas. Oni rakontis al vi sensencaĵon, ĉar ne ekzistas tia monto kun tia kastelo.

Ekploris la eminentulo kaj diris:

—Ĝi nepre ekzistas. Ie ĝi troviĝas.

Diris tiu neordinara homo: «Oni rakontis al vi sensencaĵon». Sed la eminentulo insistis. Tiam la sovaĝulo diris:

—Laŭ mia opinio, ĝi estas absurdaĵo, sed ĉar vi insistas, jen mi estas ĉefo super la bestoj. Por komplezi vin, mi vokos ilin. Ili rondiras sur la tero, eble unu el ili scias pri tiu monto kun la kastelo.

Li do vokis la bestojn, de la malgrandaj ĝis la grandaj, kaj demandis ilin. Ĉiuj respondis, ke ili tion ne vidis. Diris la sovaĝulo:

—Rigardu! Sensencaĵon oni rakontis al vi. Aŭskultu min, returniĝu, ĉar vi nenion trovos. Ĝi tute ne ekzistas.

Sed la eminentulo ne cedis: «Ĝi nepre ekzistas». Tiam diris la sovaĝulo:

—Jen en la dezerto loĝas mia frato. Li estas ĉefo super la birdoj. Eble ili scias, ili flugas ja alte super la tero. Eble ili vidis tiun monton kun la kastelo. Iru al li kaj diru: mi sendis vin.

Kelke da jaroj li vagadis, serĉante la fraton. Fine li trovis viron altkreskan. Ankaŭ tiu portis grandegan arbon kaj li demandis la saman demandon.

La eminentulo rakontis pri sia afero, kaj diris la frato sendis lin al li. Ĉi tiu same respondis: «Ĝi ne ekzistas». Tamen la eminentulo ne cedis: «Jes, ĝi ekzistas». Diris la viro:

—Jen mi estas ĉefo super la birdoj. Mi vokos ilin, eble ili scias.

Li vokis la birdojn, de la malgrandaj ĝis la grandaj, kaj demandis ilin.

Ciuj same respondis: ili ne scias pri tia monto kun kastelo. Tiam la viro diris:

—Rigardu! Tia monto kun kastelo ne ekzistas. Aŭskultu min, returnigu, ĉar ĝi nenie troviĝas.

Sed la eminentulo insistis. Diris al li la sovaĝulo:

—Profunde en la dezerto loĝas mia frato. Li estas ĉefo super la ventoj. Ĉi tiuj rondiras en la tuta mondo. Eble ili scias.

Vagadis la eminentulo plurajn jarojn serĉante ties fraton. Ree li renkontis altkreskulon. Ankaŭ tiu portis grandegan arbon, kaj li demandis la saman demandon. La eminentulo rakontis pri sia afero, kaj la sovaĝulo malkonsilis lin. Sed tiu insistis. Fine diris la sovaĝulo: «Por komplezi vin, mi vokos la ventojn kaj demandos». Li vokis ilin, tamen neniu sciis pri tia monto kun kastelo. Tiam la viro diris:

—Rigardu! Sensecaĵon oni rakontis al vi.

Ekploris la eminentulo kaj diris:

—Mi scias, ke ĝi ekzistas.

En tiu momento ili rimarkis, ke venis ankoraŭ alia vento. Ekkoleris la ĉefo:

—Kial vi malfruiĝis? Mi ordonis, ke

venu ĉiuj ventoj. Kial vi ne venis kune kun ili?

Rakontis la vento:

—Mi prokrastiĝis, ĉar mi devis forporti principinon al ora monto kun kastelo el perloj.

Aŭdinte tion, la eminentulo ekĝojis.

Kaj la sovaĝulo demandis la venton: «Kiu objekto estas tie multekosta? Kio estas forte dezirata?».

Respondis la vento:

—Ĉio estas multekosta.

Tiam diris la sovaĝulo al la eminentulo:

—Tre longe vi jam serĉadas kaj multe da mizeroj vi devis travivi. Vi bezonas monon. Jen mi donas al vi vazon. Kiam vi etendos vian manon al la vazo, vi prenos el tie monon.

Kaj li ordonis al la vento, ke ĝi forportu tien la eminentulon. Aperis la uragano, portis lin kaj venigis ĝis la pordego de la urbo. Sed tie staris soldatoj kaj ne lasis lin eniri.

Tuj li etendis sian manon al la vazo, prenis el tie monon, subaĉetis la soldatojn kaj eniris. La urbo estis beleaga. Li kontaktis riĉulon kaj aranĝis, ke tiu provizu lin ĉiutage per nutraĵoj. Li konsciis, ke li devos resti tie iom pli longe, ĉar necesas agi prudente kaj saĝe, por elirigi ŝin.

Sed kiel li ŝin elirigis,

li ne rakontis.

Li tamen

elirigis

ŝin.

El la jida: *N. Z. Maimon*

KLARIGO

En numero 3/79 de «Horizonto» p. 63-64, aperas monologo IDUS MARTIE, de la konata verkistino Zora Heide. — Mi petas senkulpigon al nia kunlaborantino, s-ino Z. Heide pro la anonima apero de ŝia monologo IDUS MARTIE.

I. G.

DONACOJ POR «HORIZONTO» — 1979

<i>Gisnuna sumo</i>	9.100 ptoj.	Jaime Perarnau, Tarrasa (Hispanujo) ...	500 »
August Daxberger, Aschach (Aŭstrujo) ...	100 »	Víctor Ortiz, Zaragoza (Hispanujo) ...	500 »
José F. Soler, Valencia (Hispanujo)	250 »		
Ges-roj Laurie, Bournemouth (Britujo) .	700 »		13.150 »
Joaquín Bielsa, Zaragoza (Hispanujo) ...	2.000 »		

PRESERAROJ EN «HORIZONTO»

De la komenco de la jaro ŝajnas ke petola koboldeto dancas en la presejo dum la kompostado de «Horizonto».

La presisto petas de la legantoj senkulpigon pro la ĝeno trovi preserarojn en la revuo.

1. *Malsimetria vortformado en Esperanto*

Senĉese aperas sur la paĝoj de la Esperanta gazetaro diskutoj pri la uzo de la vortfinajo *-io*, precipe rilate loknomojn. Citindaj estas la artikolo de Henrik Seppik aperinta en *Esperanto* /decembro 1976, p. 203/ kaj la prikomentado de Germaine Kirtz en la sama revuo /aprilo 1977, p. 69/. Lastatempe estis publikigita en *Horizonto* /marto-aprilo 1979, p. 41-45/ artikolo el la plumo de Edwin de Kock, kiu pritraktas la saman komplikan temon, sed bedaŭrinde, iom supraĵe kaj per malnovaj argumentoj. La komentoj, kiujn mi origine verkis pri la enhavo de la artikolo de s-ro Seppik rilatas ankaŭ al kelkaj asertoj de s-ro de Kock.

La ekzemploj de la uzo de gentaj kaj naciaj nomoj en la ĉi supre menciitaj artikoloj reliefigas problemojn en Esperanto, kiu estas pli ampleksa ol la loknoma demando: *-io* aŭ *-ujo*? Temas pri la manko de centprocenta reguleco en Esperanto — alivorte, pri malsimetrioj¹². Seppik ne alfrontas tiun ĉi problemon rekte, kaj pro tio mi deziras utiligi kelkajn ekzemplojn en lia artikolo por montri, kie troviĝas tiuj malsimetrioj en Esperantaj gent- kaj loknomoj. Fakte, la nereguleco en la formado de tiuj ĉi nomoj en Esperanto spegulas iom de la etnolingva kaoso, dum pli logika aŭ konsekvenca sistemo estas postulenda en planlingvo.

2. *Gentoj kaj landoj*

La esenco de la problemoj estas la elekto de la ĝusta formo de landnomoj, kiuj baziĝas sur gentnomoj. Laŭ la zamenhofa principo, la nomo de malnova lando estas formita per aldono de la sufikso *-uj* al radiko, kiu estas la nomo de la ĉefa aŭ reganta gento en la lando /Zamenhof, 1962, p. 14-15/. Jen kelkaj ekzemploj: *germano-Germanujo*; *egipto-Egiptujo*; *hindo-Hindujo*; *ĥino-Hinujo*. Sed ĉu tiu ĉi simpla regulo kaŭzas kapdolorojn al esperantistoj. Zamenhof mem hezitis pri la signifo de la radiko *egipt-*: ĉu gento, ĉu lando? En la ĉi-supre citita Lingva Respondo li pravigis la gentnoman signifon de *egipt-*, sed la uzado ne estis unuforma, kaj ankoraŭ hodiaŭ oni povas legi kaj aŭdi pri la lando *Egipto*.

Zamenhof pritraktis ankaŭ tri eŭropajn esceptojn, por kiuj la sufikso *-uj* estas ne tute logika: *Austrujo*, *Belgujo* kaj *Svisujo*. Plena *Ilustrita Vortaro* /PIV/ uzas la radikon *aŭtri-* por formi la landnomon, do enloĝanto devas nomiĝi *aŭstriano*. Zamenhof, en sia memuaro «Gentoj kaj Lingvo Internacia» /Zamenhof, 1929, p. 346/ nomas la enloĝantojn de Austrujo germanoj, tiel montrante, ke lia opinio *aŭstr-* ne povas esti gentnomo. Male, Seppik uzis ĝin por nomi la popolon de Aŭstrio. Kvankam la radikoj *belg-* kaj *svis-* ne estis pritraktitaj en lia artikolo, ili probable estus traktitaj same kiel *belg-*. En PIV *belgo* estas la nomo de kelta popolo loĝanta en la nordokcidenta Eŭropo en la antikveco. Sekve, *Belgujo* devas havi la signifon de la tuta teritorio loĝata de la belgoj en Nord-Gaŭlujo inter Sejno kaj Marno. Civitanoj de la hodiaŭa *Belgio*, kies ĉefgentoj estas flandroj kaj valonoj, ne estas *belgoj* sed *belgianoj*. La tria radiko, kies pluformado ne estas logika laŭ Zamenhof estas *svis-*. Laŭ PIV *sviso* estas «civitano de Svislando», sed etimologie la radiko devenas de la loknomo Schwyz, unu el la praktikantoj, kiu donis sian nomon al la Federacio. La lando nomiĝas en la enlandaj lingvoj: /france/ *Suisse*; /germane/ *Schweiz*; /itale/ *Svizzera*; /romance/ *Svizzra*. Tuthazarde, en kelkaj naciaj lingvoj la nomo de la enloĝanto havas la saman formon kiel tiu de la lando: /france/ *Suisse*, *suisse*. Ĉiuokaze, *svis-* ne taŭgas kiel gentnomo, kaj Zamenhof pravis, kiam li rigardis *Svisujo* nelogika formo. Oni prefere diru *Svisio* aŭ *Svislando* /kp. la anglan nomon *Switzerland*/ por la lando kaj *svisiano* aŭ *svislandano* por la enloĝanto¹³.

Zamenhof ne pritraktis la problemon de *Jugoslavio*, ĉar tiu lando ne ekzistis tiutempe. Etimologie la du slavaj morfemoj konsistigantaj la landnomon signifas «sud» kaj «slavo». Laŭ PIV *jugoslav/o* signifas «ano de la Jugoslava Federacio», do ĝi estas traktita same kiel *sviso*, kaj la formo *Jugoslavio* estas la landnomo. Same kiel *sviso*, *jugoslavo* ne estas gentnomo; la gentoj en tiu lando estas kroatoj, serboj, slovenoj, ktp.

3. *Antikvaj kaj modernaj landoj*

Lastatempe mi alfrontis praktikan problemon por diferencigi teritorion loĝatan de tria gento disde administra regiono, kiam mi verkis artikolon pri la romia periodo en Mezeŭropo¹⁴. En PIV troviĝas la nomoj de la romiaj provincoj *Ilirio* kaj *Panonio* sed sen indiko, ke ili devenas de la nomoj de gentoj, la *iliroj* kaj la *panonoj*. Kontraŭe, kiel artikolvortoj en PIV aperas gentoj kiel *dalmato* kaj *daco*, kiuj donis sian nomon al la provincoj *Dalmatio* aŭ *Dalmatujo* kaj *Dacujo*. Estas evidente, ke la nomenklaturaro de antikvaj gentoj kaj landoj en PIV ne estas tute konsekvenca¹⁵. Krome, la difinoj, de faka vidpunkto, ne estas adekvataj. Mi proponas, ke la gentnomaj radikoj estu pluformitaj per la sufikso *-uj* por doni la nomon de la teritorio okupita de ili, foje pli vasta, foje pli malvasta, ol la politika unuo establita de la romianoj. Tiu ĉi regiono povas esti esprimita per la finaĵo *-io* aldonita al la gentnomo. Per etendo de signifo, la

moderna lando povas reteni tiun ĉi formon, aŭ se oni opinias, ke okazos konfuzo aŭ ambigueco, eblas plivastigi la signifon de la sufikso *-ik* kaj uzi ĝin por la nomo de la romiaj provincoj laŭ la sekvaj ekzemploj:

a. Ilirujo — la teritorio loĝata de la *iliroj*

Iliriko — la romia provinco *Illyricum* kun *iliroj* kaj *ilirikanoj*

Ilirio — la regiono en la nordokcidenta parto de la nuna Jugoslavio, kies enloĝantoj estas *ilirianoj*.

Kvankam *Iliriko* ne troviĝas en PIV, ĝi estas en la *Sankta Biblio* /Rom 15.19/ kaj estas registrita de Wannemakers /1963, p. 27/.

b. Belujo — la teritorio loĝata de la *belgoj*

Belgiko — la romia provinco *Belgica* kun *belgoj* kaj *belgikanoj*

Belgio — la nuntempa ŝtato, kies enloĝantoj estas *belgianoj*.

Per tiu ĉi rimedo, la adjektiva paro *belga/belgia* esprimas en Esperanto precize la samon kiel la anglaj adjektivoj *Belgic/Belgian*.

La nekonsekvenco de PIV troviĝas ankaŭ en antikvaj loknomoj kiel *Luzitania*, *Helvetio* aŭ *Helvetujo*, kaj *Iberujo*. Ne estas menciite, ke gento, la *luzitanoj*, donis sian nomon al la provinco *Luzitania*. Ili loĝis en relative malgranda regiono de la okcidenta parto de la pirenea duoninsulo kaj poste disvastiĝis, do ilia loĝteritorio estis *Luzitanujo*. La landlimoj de la romia provinco *Luzitania* koincidas pli malpli kun tiuj de la nuntempa Portugalio. La *helvetoj* estis kelta gento, kiun la romianoj trovis en la regiono limita de la riveroj Majno kaj Neckar, kaj Alpoj, t.e. *Helvetujo*. Sub la romia regado ĝi estis *Helvetio*, nomo, kiu estas uzata eĉ hodiaŭ kiel sinonimo de Svisio. PIV ja prave klarigas, ke *ibero* estas «ano de antikva popolo, kiu loĝis en okcidenta Eŭropo, de Irlando ĝis Sicilio», sed ĝi difinas *Iberujo* nelogike kiel «antikva nomo por Hispanujo». Tiu ĉi devas esti *Iberio*, por ke *Iberujo* signiflu la pli vastan loĝlokon de la iberoj.

Nun devas esti evidente, ke mi argumentas nek por *-ujo*, nek por *-io* kiel finaĵo de loknomoj, sed por *ambaŭ* sufiksoj, ĉar ili estas utilaj por distingi diversajn spacajn kaj tempajn karakterojn de geografiaj regionoj. Ankaŭ PIV utiligas tiun ĉi rimedon en la sekvaj ekzemploj:

c. Rusujo — «imperio de la caroj, entenanta la Eŭropan Rusujon kaj Siberion»

Rusio — «unu, la plej grava, el la Federaj Respublikoj de Sovet-Unio»

ĉ. Moldavujo — «Danuba prinĉejo, kiu, kunigita en 1859 kun Valaĥujo, formis la reĝlandon Rumanujo»

Moldavio — «unu el la Federaj Respublikoj de Sovet-Unio»

Bedaŭrinde, PIV ne aplikas tiun ĉi simetrian procedon ĉe aliaj landnomoj. Anstataŭ la atendata paro *Tracujo/Tracio* troviĝas:

d. Tracujo — «regiono situanta norde de Helenujo»

Trakio aŭ Trakujo — «la suda parto de Bulgarujo»

Ĉar tie ĉi temas pri konsonanta ŝanĝo, oni povas analogie formi la sekvan paron sammaniere: *Macedonujo/Makedonujo*, sed PIV ne faras tion. *Macedonujo* aŭ *Macedonio* estas «montara regiono norde de Grekujo, reĝlando en la antikva tempo, nun dividita inter Jugoslavio, Bulgarujo kaj Grekujo». Tamen, en *Poŝatlaso de la Mondo* la Jugoslava Federa Respubliko nomiĝas *Makedonio*, kaj en la *Esperanto-Bulgara Vortaro* /Sarafov, 1963/ la simetrio estas perfekta: *trac-/trak-* kaj *macedon-/makedon-*.

Alia landnomo, kiu diferencigas sin historie per konsonantoŝanĝo estas *Izraelo* /«regno, konsistanta el la nordaj hebreaj triboj»/ kaj *Israelo* /«ŝtato fondita en 1948»/. Tiu solvo verŝajne neniam enradikiĝos en la lingvo, ĉar en rapide konversacio la «s» antaŭ la «r» fariĝos voĉa, kaj neniu diferenco inter la du nomoj estos aŭdebla. Ne estas rekomendinda minimuma diferencigo per unu sola litero — aŭ konsonanto aŭ vokalo — ĉar estas malfacile memori la signifojn. Oni pensu pri la malfacilaĵoj, kiujn kaŭzas jenaj paroj de paronimoj: *pesi/pezi*; *muso/muŝo*; *polvo/pulvo*, ktp./vd. Golden, 1978, por detala pritrakto de tiu ĉi fenomeno en Esperanto/. Pli bona kontrasto estus *Izraelo/Izraelio*.

Alia maniero diferencigi antikvajn regionojn disde modernaj ŝtatoj estas per la uzo de ĝemelradikoj bazitaj sur etimoj el du aŭ pli da lingvoj^{1/}. La sekvaj ekzemploj montras, kiel eblas fari tion.

e. Longobardo — «ano de ĝermana gento, kiu invadis Italujon en la 6a jc.»

Lombardo — «loĝanto de Lombardujo ... norda parto de Italujo»

f. Lotaringio — «regno mezepoka, inter Francujo kaj Germanujo»

Loreno — «franca provinco kaj regiono»

Kelkfoje estas eble uzi du tute malsimilajnradikojn.

g. Heleno — «ano de unu el la hind-eŭropaj triboj...» /apud Egea maro/

Greko — «ano de la ĉefgento loĝanta en Grekujo»

1. *Malsimetria vortformado en Esperanto*

Senĉese aperas sur la paĝoj de la Esperanta gazetaro diskutoj pri la uzo de la vortfinajo *-io*, precipe rilate loknomojn. Citindaj estas la artikolo de Henrik Seppik aperinta en *Esperanto* /decembro 1976, p. 203/ kaj la prikomentado de Germaine Kirtz en la sama revuo /aprilo 1977, p. 69/. Lastatempe estis publikigita en *Horizonto* /marto-aprilo 1979, p. 41-45/ artikolo el la plumo de Edwin de Kock, kiu pritraktas la saman komplikan temon, sed bedaŭrinde, iom supraĵe kaj per malnovaj argumentoj. La komentoj, kiujn mi origine verkis pri la enhavo de la artikolo de s-ro Seppik rilatas ankaŭ al kelkaj asertoj de s-ro de Kock.

La ekzemploj de la uzo de gentaj kaj naciaj nomoj en la ĉi supre menciitaj artikoloj reliefigas problemon en Esperanto, kiu estas pli ampleksa ol la loknoma demando: *-io* aŭ *-ujo*? Temas pri la manko de centprocenta reguleco en Esperanto — alivorte, pri malsimetrioj ¹². Seppik ne alfrontas tiun ĉi problemon rekte, kaj pro tio mi deziras utiligi kelkajn ekzemplojn en lia artikolo por montri, kie troviĝas tiuj malsimetrioj en Esperantaj gent- kaj loknomoj. Fakte, la nereguleco en la formado de tiuj ĉi nomoj en Esperanto spegulas iom de la etnolingva kaoso, dum pli logika aŭ konsekvenca sistemo estas postulenda en planlingvo.

2. *Gentoj kaj landoj*

La esenco de la problemo estas la elekto de la ĝusta formo de landnomoj, kiuj baziĝas sur gentnomoj. Laŭ la zamenhofa principo, la nomo de malnova lando estas formita per aldono de la sufikso *-uj* al radiko, kiu estas la nomo de la ĉefa aŭ reganta gento en la lando /Zamenhof, 1962, p. 14-15/. Jen kelkaj ekzemploj: *germano-Germanujo*; *egipto-Egiptujo*; *hindo-Hindujo*; *ĥino-Hinujo*. Sed ĉu tiu ĉi simpla regulo kaŭzas kapdolorojn al esperantistoj. Zamenhof mem hezitis pri la signifo de la radiko *egipt-*: ĉu gento, ĉu lando? En la ĉi-supre citita Lingva Respondo li pravigis la gentnoman signifon de *egipt-*, sed la uzado ne estis unuforma, kaj ankoraŭ hodiaŭ oni povas legi kaj aŭdi pri la lando *Egipto*.

Zamenhof pritraktis ankaŭ tri eŭropajn esceptojn, por kiuj la sufikso *-uj* estas ne tute logika: *Austrujo*, *Belgujo* kaj *Svisujo*. Plena *Ilustrita Vortaro* /PIV/ uzas la radikon *aŭtri-* por formi la landnomon, do enloĝanto devas nomiĝi *aŭstriano*. Zamenhof, en sia memuaro «Gentoj kaj Lingvo Internacia» /Zamenhof, 1929, p. 346/ nomas la enloĝantojn de Austrujo germanoj, tiel montrante, ke lia opinio *aŭstr-* ne povas esti gentnomo. Male, Seppik uzis ĝin por nomi la popolon de Aŭstrio. Kvankam la radikoj *belg-* kaj *svis-* ne estis pritraktitaj en lia artikolo, ili probable estus traktitaj same kiel *aŭstr-*. En PIV *belgo* estas la nomo de kelta popolo loĝanta en la nordokcidenta Eŭropo en la antikveco. Sekve, *Belgujo* devas havi la signifon de la tuta teritorio loĝata de la belgoj en Nord-Gaŭlujo inter Sejno kaj Marno. Civitanoj de la hodiaŭa *Belgio*, kies ĉefgentoj estas flandroj kaj valonoj, ne estas *belgoj* sed *belgianoj*. La tria radiko, kies pluformado ne estas logika laŭ Zamenhof estas *svis-*. Laŭ PIV *svis/o* estas «civitano de Svislando», sed etimologie la radiko devenas de la loknomo Schwyz, unu el la praktikantoj, kiu donis sian nomon al la Federacio. La lando nomiĝas en la enlandaj lingvoj: /france/ *Suisse*; /germane/ *Schweiz*; /itale/ *Svizzera*; /romance/ *Svizra*. Tuthazarde, en kelkaj naciaj lingvoj la nomo de la enloĝanto havas la saman formon kiel tiu de la lando: /france/ *Suisse*, *suisse*. Ĉiuokaze, *svis-* ne taŭgas kiel gentnomo, kaj Zamenhof pravis, kiam li rigardis *Svisujo* nelogika formo. Oni prefere diru *Svisi/o* aŭ *Svislando* /kp. la anglan nomon *Switzerland*/ por la lando kaj *svisiano* aŭ *svislandano* por la enloĝanto ¹³.

Zamenhof ne pritraktis la problemon de *Jugoslavio*, ĉar tiu lando ne ekzistis tiutempe. Etimologie la du slavaj morfemoj konsistigantaj la landnomon signifas «sud» kaj «slavo». Laŭ PIV *jugoslav/o* signifas «ano de la Jugoslava Federacio», do ĝi estas traktita same kiel *svis/o*, kaj la formo *Jugoslavio* estas la landnomo. Same kiel *sviso*, *jugoslavo* ne estas gentnomo; la gentoj en tiu lando estas kroatoj, serboj, slovenoj, ktp.

3. *Antikvaj kaj modernaj landoj*

Lastatempe mi alfrontis praktikan problemon por diferencigi teritorion loĝatan de tria gento disde administra regiono, kiam mi verkis artikolon pri la romia periodo en Mezeŭropo ¹⁴. En PIV troviĝas la nomoj de la romiaj provincoj *Ilirio* kaj *Panonio* sed sen indiko, ke ili devenas de la nomoj de gentoj, la *iliroj* kaj la *panonoj*. Kontraŭe, kiel artikolvorto en PIV aperas gentoj kiel *dalmato* kaj *daco*, kiuj donis sian nomon al la provincoj *Dalmatio* aŭ *Dalmatujo* kaj *Dacujo*. Estas evidente, ke la nomenklaturaro de antikvaj gentoj kaj landoj en PIV ne estas tute konsekvenca ¹⁵. Krome, la difinoj, de faka vidpunkto, ne estas adekvataj. Mi proponas, ke la gentnomaj radikoj estu pluformitaj per la sufikso *-uj* por doni la nomon de la teritorio okupata de ili, foje pli vasta, foje pli malvasta, ol la politika unuo establita de la romianoj. Tiu ĉi regiono povas esti esprimita per la finaĵo *-io* aldonita al la gentnomo. Per etendo de signifo, la

moderna lando povas reteni tiun ĉi formon, aŭ se oni opinias, ke okazos konfuzo aŭ ambigueco, eblas plivastigi la signifon de la sufikso *-ik* kaj uzi ĝin por la nomo de la romiaj provincoj laŭ la sekvaj ekzemploj:

a. Ilirujo — la teritorio loĝata de la *iliroj*

Iliriko — la romia provinco *Illyricum* kun *iliroj* kaj *ilirikanoj*

Ilirio — la regiono en la nordokcidenta parto de la nuna Jugoslavio, kies enloĝantoj estas *ilirianoj*.

Kvankam *Iliriko* ne troviĝas en PIV, ĝi estas en la *Sankta Biblio* /Rom 15.19/ kaj estas registrita de Wannemakers /1963, p. 27/.

b. Belgujo — la teritorio loĝata de la *belgoj*

Belgiko — la romia provinco *Belgica* kun *belgoj* kaj *belgikanoj*

Belgio — la nuntempa ŝtato, kies enloĝantoj estas *belgianoj*.

Per tiu ĉi rimedo, la adjektiva paro *belga/belgia* esprimas en Esperanto precize la samon kiel la anglaj adjektivoj *Belgic/Belgian*.

La nekonsekvenco de PIV troviĝas ankaŭ en antikvaj loknomoj kiel *Luzitania*, *Helvetio* aŭ *Helvetujo*, kaj *Iberujo*. Ne estas menciite, ke gento, la *luzitanoj*, donis sian nomon al la provinco *Luzitania*. Ili loĝis en relative malgranda regiono de la okcidenta parto de la pirenea duoninsulo kaj poste disvastiĝis, do ilia loĝteritorio estis *Luzitanujo*. La landlimoj de la romia provinco *Luzitania* koincidas pli malpli kun tiuj de la nuntempa Portugalio. La *helvetoj* estis kelta gento, kiun la romianoj trovis en la regiono limita de la riveroj Majno kaj Neckar, kaj Alpoj, t.e. *Helvetujo*. Sub la romia regado ĝi estis *Helvetio*, nomo, kiu estas uzata eĉ hodiaŭ kiel sinonimo de Svisio, PIV ja prave klarigas, ke *ibero* estas «ano de antikva popolo, kiu loĝis en okcidenta Eŭropo, de Irlando ĝis Sicilio», sed ĝi difinas *Iberujo* nelogike kiel «antikva nomo por Hispanujo». Tiu ĉi devas esti *Iberio*, por ke *Iberujo* signiflu la pli vastan loĝlokon de la iberoj.

Nun devas esti evidente, ke mi argumentas nek por *-ujo*, nek por *-io* kiel finaĵo de loknomoj, sed por *ambaŭ* sufiksoj, ĉar ili estas utilaj por distingi diversajn spacajn kaj tempajn karakterojn de geografiaj regionoj. Ankaŭ PIV utiligas tiun ĉi rimedon en la sekvaj ekzemploj:

c. Rusujo — «imperio de la caroj, entenanta la Eŭropan Rusujon kaj Siberion»

Rusio — «unu, la plej grava, el la Federaj Respublikoj de Sovet-Unio»

ĉ. Moldavujo — «Danuba prinĉejo, kiu, kunigita en 1859 kun Valaĥujo, formis la reglandon Rumanujo»

Moldavio — «unu el la Federaj Respublikoj de Sovet-Unio»

Bedaŭrinde, PIV ne aplikas tiun ĉi simetrian procedon ĉe aliaj landnomoj. Anstataŭ la atendata paro *Tracujo/Tracio* troviĝas:

d. Tracujo — «regiono situanta norde de Helenujo»

Trakio aŭ Trakujo — «la suda parto de Bulgarujo»

Ĉar tie ĉi temas pri konsonanta ŝanĝo, oni povas analogie formi la sekvan paron sammaniere: *Macedonujo/Makedonujo*, sed PIV ne faras tion. *Macedonujo* aŭ *Macedonio* estas «montara regiono norde de Grekujo, reĝlando en la antikva tempo, nun dividita inter Jugoslavio, Bulgarujo kaj Grekujo». Tamen, en *Poŝatlaso de la Mondo* la Jugoslava Federa Respubliko nomiĝas *Makedonio*, kaj en la *Esperanto-Bulgara Vortaro* /Sarafov, 1963/ la simetrio estas perfekta: *trac-/trak-* kaj *macedon-/makedon-*.

Alia landnomo, kiu diferencigas sin historie per konsonantoŝanĝo estas *Izraelo* /«regno, konsistanta el la nordaj hebreaj triboj»/ kaj *Israelo* /«ŝtato fondita en 1948»/. Tiu solvo verŝajne neniam enradikiĝos en la lingvo, ĉar en rapide konversacio la «s» antaŭ la «r» fariĝos voĉa, kaj neniu diferenco inter la du nomoj estos aŭdebla. Ne estas rekomendinda minimuma diferencigo per unu sola litero — aŭ konsonanto aŭ vokalo — ĉar estas malfacile memori la signifojn. Oni pensu pri la malfacilaĵoj, kiujn kaŭzas jenaj paroj de paronimoj: *pesi/pezi*; *muso/muŝo*; *polvo/pulvo*, ktp./vd. Golden, 1978, por detala pritrakto de tiu ĉi fenomeno en Esperanto/. Pli bona kontrasto estus *Izraelo/Izraelio*.

Alia maniero diferencigi antikvajn regionojn disde modernaj ŝtatoj estas per la uzo de ĝemelradikoj bazitaj sur etimoj el du aŭ pli da lingvoj^{16/}. La sekvaj ekzemploj montras, kiel eblas fari tion.

e. Longobardo — «ano de ĝermana gento, kiu invadis Italujon en la 6a jc.»

Lombardo — «loĝanto de Lombardujo ... norda parto de Italujo»

f. Lotaringio — «regno mezepoka, inter Francujo kaj Germanujo»

Loreno — «franca provinco kaj regiono»

Kelkfoje estas eble uzi du tute malsimilajnradikojn.

g. Heleno — «ano de unu el la hind-eŭropaj triboj...» /apud Egea maro/

Greko — «ano de la ĉefgento loĝanta en Grekujo»

ĝ. Hibernio — «latina nomo de Irlanda»
 Irlando — «insulo de la Brita insularo»

La radiko *nov-* estas ofte uzata kiel prefikso aŭ epiteto por nomi relative novan lokon laŭ jam ekzistanta aŭ ekzistinta lando aŭ urbo: *Nov-Zelando*, *Nov-Jorko*, *Nova Sud-Kimrujo*. Logike oni povas uzi *old-* sammaniere, sed ĝis nun mi registris nur unu ekzemplon: *Old-Germanio*, t.e. la iama Germanujo.

Por diferencigi nomojn de modernaj kaj antikvaj landoj, M. Halvelik /1973, p. 50/ lastatempe provis enkonduki la sufikson *-ij* kun la signifo «ŝtata, politika unuo». Jam antaŭe ĝi estis proponita de E. Gasse /1964, p. 7/ por landnomoj. Halvelik rezervas la kutiman sufikson *-uj* por pure geografiaj aŭ kulturaj konceptoj kaj eliminis la pseŭdo-sufikson *-i/o/* el landnomado. Lia «solvo» do, ne estas tiel simpla kiel tiu de s-ro de Kock, kiu celas elimini *-io* en ĉiuj landnomoj, kie estas eble uzi *-ujo*. Cetere, Halvelik uzas ankaŭ ĝemelradikojn por krei sian simetrian sistemon.

<i>pragento</i>	<i>antikva ŝtato</i>	<i>aktuala gento</i>	<i>aktuala ŝtato</i>
Belgo	Belgujo	Belĝo	Belĝijo
Germano	Germanujo	Germano	Germanijo
Egipto	Egiptujo	Eĝipto	Eĝiptijo

Konklude, mi dezirus emfazi, ke la manko de simetrio en la formado de Esperantaj nomoj kaj terminoj, kiuj laŭsignife inter-rilatas, malfermas la vojon por la kritiko, ke Esperanto estas same neregula kiel etnaj lingvoj, aŭ eĉ pli neregula, kiam temas pri loknomoj.

Bernard Golden

Notoj

- /1/ Tiu ĉi artikolo estas reverkita versio de pli frua artikolo /1976/ titolita «Ne '-ujo aŭ -io?' sed '-ujo kaj -io!'»
- /2/ Mi pritraktis la temon de malsimetrioj en Esperanto ĝenerale kaj ankaŭ rilate loknomojn en jam publikigitaj artikoloj /vd. Golden, 1975; 1979a; 1979b/.
- /3/ En Ido *Suisia* estas la landnomo kaj *suisiano* la nomo de la enloĝanto. *Suiso* estas nur mallongigo de la regula formo *suisiano* kaj devas esti rigardata kiel aparta kazo /Beaufront, 1925, p. 26/.
- /4/ «Valcum — fortikigita romia kolonio ĉe Balatono» aperonta en 1979 en *Scienca Revuo*.
- /5/ Mi prikomentis kelkajn ekzemplojn en mia ankoraŭ ne publikigita referaĵo «Kelkaj problemoj rilate la ellaboron de arkeologia fakterminologio en Esperanto» prezentita ĉe la Esperantologia Konferenco de la 63-a Universala Kongreso en Varna, 1978.
- /6/ Ĝemelaj radikoj en Esperanto estas pritraktitaj de F.I. Wiener /1950, p. 98-106/.

Konsultitaj verkoj

- BEAUFONT, Louis de. 1925. *Komplete gramatiko detaloza di la linguo internaciona Ido*. Esch-Alzette /Luxemburgia/.
- GASSE, Emile. 1964. *Raciaj derivaĵoj kaj verbuzoj*. s.l.
- GOLDEN, Bernard. 1975. «Lingvaj malsimetrioj.» *Heroldo de Esperanto*, 18 marto, n-ro 1575-76, p. 8.
- GOLDEN, Bernard. 1978. «La problemoj de paronimoj en Esperanto.» *Paco*, vol. 25, n-ro 3, p. 10-11.
- GOLDEN, Bernard. 1979a. «Malsimetrioj en Esperantaj loknomoj.» *Venezuela Stelo*, februaro, n-ro 16, p. 6-8.
- GOLDEN, Bernard. 1979b. «Malsimetriaĵoj malfacilaĵoj en Esperanto.» *Esperanto en Skotlando*, n-ro 113, p. 18-21.
- HALVELIK, Manuel. 1973. *Popido — la verda dialekto*. Brugge.
- KIRTZ, Germaine. 1977. «Pri la finaĵoj '-ia' kaj '-a'.» *Esperanto*, aprilo, n-ro 4 /865/, p. 69.
- KOCK, Edwin de. 1979. «Pri kaj ĉirkaŭ sufiksa, precipe landnoma '-io'.» *Horizonto*, marto-aprilo, n-ro 4 /20/, p. 41-45.
- PLENA ILUSTRITA VORTARO /PIV/. 1970. Paris.
- POSATLASO DE LA MONDO. 1971. Praha.
- SARAFOV, Ivan, k.a. 1963. *Esperanto-Bulgara vortaro*. Sofia.
- SEPPIC, Henrik. 1976. «Cu -ia aŭ simple -a?» *Esperanto*, decembro, n-ro 12 /852/, p. 203.
- WANNEMAKERS, H. G. 1963. *Propraj nomoj en la Nova Testamento*. Tilburg, Nederlando.
- WIENER, F. I. 1950. «Ĝemelaj radikoj.» *Esperantologio*, vol. 1, n-ro 2, p. 98-106.
- ZAMENHOF, Ludoviko L. 1929. *Originala Verkaro*. Leipzig. «Gentoj kaj Lingvo Internacia» — p. 345-353.
- ZAMENHOF, Ludoviko L. 1962. *Lingvaj Respondoj*. 6-a eldono. Marmande, Francio. /Lingva Respondo 18B — p. 14-15/.

Glosoj

Gaŭlujo — por eviti vorton kun duobla konsonanto — *Gallujo* /PIV/ — mi preferas uzi la radikon *Gaŭl-* jam registritan en *Plena Vortaro Esperanto-Esperanta* de E. Boirac /Paris, 1909-1910/ kaj *Enciklopedia Vortaro Esperanta* de Ch. Verax /Paris, 1910/; kp. jenajn etnolingvajn formojn: /france/ *gaulois*, *Gaule*; /angle/ *Gaul*, *Gaul*.



Ateno

En la mitologio de la malnovaj popoloj, precipe en la arja ekzistas kiel esenca parto, poezia disvolviĝo eksterordinare brila, rezulto de kvazaŭ mistika kontemplado de la grandioza spektaklo prezentata de la naturo, speciale tiu de la suno, kaj de la dieca lumo, laŭ la suna teorio.

La arja mitologio, same kiel la ceteraj de la primitivaj popoloj, enhavas kiel esencan elementon, aron da naturaj elementoj, laŭ la lumo de la primitivaj tradicioj elradikiĝintaj el la mitoj, kaj religiaj kredoj, de la homoj de l' pratempo.

Tiel, la nomoj Febo, Apolo, Helios, Hiperion... estis dediĉitaj al la suno.

El la helena mitologio, la naskiĝo de Atenea estas unu el la plej kuriozaj mitoj de Grekujo.

Kiam Zeus voris sian edzinon Metis, li tuj sentis teruran kapdoloron; tiam li, la reĝo de la dioj, sin turnis al sia filo Vulkano, al kiu li petis ke per la martelo de sia forĝejo, li levu al li la kranian volbon. — Vulkano obeis, kaj subite ekaperis el la frunto de Zeus la aroganta Atenea, diino de Saĝo.

Se ni pensas pri tiu ĉi mito laŭlitere, ĝi ŝajnas stranga frenezo generita de malsana fantazio; sed, enestas en ĝi, same kiel en ĉiuj mitoj, profunda simbolismo. Ĉar Metis, la edzino vorita de Zeus simbolas la Racion, kaj ĉion, kio materie estas vorita, oni digestas kaj asimilas, la mito lernigas al ni, ke Zeus asimilis la Racion, sekve, la Racio prezidis liajn agojn kaj gvidis lian konduton. Nur tiaj psikologiaj cirkonstancoj ebligis la naskiĝon de la Saĝo. La signifo de tiu ĉi mito pruvas al la homoj, ke la Saĝo estas ido de la Racio, sekve, ke ne povas esti saĝa, nek aĝi inteligente, homo neracia.

Pluraj estis la heroaĝoj kaj diversaj agoj de Atenea, sed ni rakontos nur tiun, kiu temas pri la nomo de la ĉefurbo de Grekujo.

La urbo Ateno ricevis la nomon de Atenea, kaj ne inverse. La egipto Cekropso



fondis la urbon en la Atiko. Ĉiuj dioj disputis pri ĝi, kaj deziris ĝin kiel proprajon. Fine, ili agnoskis ke Atenea kaj Poseidon havas pli da rajtoj je ĝi, kaj oni decidis ke la urbo apartenos al tiu, kiu pli malavare dotos ĝin. Kunveninte la dioj en la Akropolo, vokis Cekropson kiel atestanton. — Poseidon frapis la rokon per tridento, kaj ekaperis ĉevalo. La dioj kaj Cekropso miris pro la vigleco, obeemo, kaj beleco de la besto, sed, samtempe, Atenea frapis la plankon per la lanco, kaj ekaperis olivarbo ŝargita je frukto.

La ĉiela tribunalo decidis ke la olivarbo, simbolo de paco, estas pli utila ol ĉevalo, simbolo de milito.

Atenea triumfe, donis sian nomon al la urbo.

J. M. U.

LA KOVRILA BILDO

Per sia venko de la batalo en la «Maraton», la atenanoj savis Grekujon de la persa jugo.

La kovrila bildo montras Templeton konstruitan de la atenanoj en Delfi memore al tiu venko.

TRA LA ESPERANTO-GAZETARO

En «ISRAELA ESPERANTISTO» (februaro, 79) A. Wandel demandas sin, «*Ĉu stagnas la movado?*» «*Nuntempe, 90 jarojn post ĝia naskiĝo, la lingvo estas pli matura, sed la ideo maljuniĝinta... Al la nuna agado ĝenerale mankas entuziasmo, inĝenieco kaj originaleco. La esenco de la nuna agado estas konservi la ekzistantajn atingojn; ĝi estas ĉefe direktita al la E-istoj, anstataŭ al la ekstera mondo. Kaj eĉ la ekzistantan potencialon oni ofte ankaŭ malgrandigas per vanaj kvereloj*». Granda kaŭzo estas forgesita en tiu listo: ia politika malsanemo de la E-istoj, kiuj tro ofte konfuzas lingvan politikon kun nura partipolitikeco; el tio sekvas la nuna stato de dissplitiĝo! Estas facile konfuzi ĉion sub la ĝenerala termino «*vanaj kvereloj*»; ekzistas ja sanaj kvereloj! Se fine la gesamideanoj bonvolus inter si celi nur la finan venkon de la lingvo, ili per konkordo akcelus ĝin. Bedaŭrinde tro multaj laŭ la vojo elektita de Tonkin deziras altrudi al la aliaj sian politikan perspektivon!

En «GAZETARA SERVO» de Aŭstria Esperanto-Movado (1/79) aperis artikolo pri nova monunuo «*IMO*». Tiel, dum la Eŭropaj Ŝtatoj mem havas tiom da malfacilaĵoj por lanĉi la Eŭropan Eskudon, pri kio revadas la ge-esperantistoj? Post la spesmilo kaj la stelo ja pri fikcia kalkul-monunuo IMO! Kiom da vanaj penoj dum stagnas la movado!

En «AŬSTRIA ESPERANTO-REVUO» (1979/1-3) oni povas legi el la rubriko «*Oni aktivas*»: «*En Knittelfeld: D-ro Adolf Halbedl sciigis, ke li intervenis favore al s-anoj Miloslav Svaček kaj Vojteĥ Srna en Ĉeĥoslovakio per skribaĵoj al la prezidanto de CEA, al la prokuroro en Hradec Kralové, al UEA kaj MEM en afero de malpermeso de la Libertempa Esperanto-Tendaro pro religia aktivado, kontraŭa al Kontrakto de Helsinki. Per letero al IKUE li sugestis instigi UEA, ke ĝi proponu al UNO fari tutmondan enketon pri malobeco al la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj, kies rezulton la Ĝenerala Sekretario de UNO submetu al ties Cefkunveno de 1979*». Nu li ne preparalis la respondojn pro la simpla kaŭzo, ke li verŝajne ankoraŭ atendas ilin! Tiam kial aldoni: «*Per detala letero li rufuzis (tiel!) la atakojn de «neŭtrala» NEM per «perspektivo» 5/78 kontraŭ UEA kaj d-ro Tonkin*»? Li preferinde refutu ilin per trafaj argumentoj el la intervenoj mem de UEA kaj Tonkin!

En «THE AŬSTRALIAN ESPERANTIST» (jan.-feb. 79) imitanto de Raymond Schwartz tiel parodias pri 1978 interalie: «*En Varna la Universala Esperanto-Asocio ne devis elekti novan papon. Oni kreis novan rekordon en la Esperanto-movado. Oni ne subfosis la Prezidanton, sed kontraŭe subtenis lin. La Prezidanto majstre prelegis, kaj ĉiuj diris, ke UEA havas ne nur bonan teatron, sed ankaŭ bonan ton-kinon. Felice li ne ludas golfon, ĉar ĉiuj rememoras la sekvon de Tonkina Golfo*». Bedaŭrinde mankas ero en tia ludo: malfeliĉe la ton-kino senĉese ekmutas ĉe la misagoj de la partipolitikaj ne-pre sed ko-legoj; kaj dramece en la historio de la movado ĝi restos la frontklino al la inklinado de la partia premgrupo!

El letero de Jerzy Leyk, titolita «*Tezoj pri la tezoj*» kaj aperinta en «*der esperantist*» (92-6/78), ekbrilis jena nuba aserto: «*En la aperta pristudo de la internacia lingva komunikado, de Esperanto kiel lingvo kaj movado, vole-nevole naskiĝas rezultoj, opinioj, konkludoj neniel favore akcepteblaj por la tradicia E-movado. Ekzemple pristudente objekte la movadon oni tuj elkovras sakon da mitoj, kiujn la movado flegas kaj kulturas. Ne multe helpas la klarigo, ke tiuj mitoj estas por la konserviĝo de la esperantlingva komunumo nepre bezonaj*». Ja kiu estas tiu «*sako da mitoj*»? Jen kio meritas precizigon, precipe pri la kriterio, laŭ kiu oni rajtas deklari ion «*mito*»!

En «*La Brita Esperantisto*» (marto-aprilo 79) enestas memorigo pri «*VOLAPUKO CENTJARA*». Jen kio efektive estas memoriginda por la «*fervora angla volapukisto kaj esperantisto, Brian Bishop*», kiu tuj celebris la daton, skribante «*la unuan gramatikon de Volapuko en Esperanto kun volapuka-esperanta vortareto*». Vere tia evento mankis! Ĉu post ok jaroj oni tiel same festos la centjarecon de Esperanto, verkante esperantan-anglamiksopotan vortareton?

El BUDAPEŝTA INFORMILO (marto 79) elstaras sur la sama paĝo 9-a du informoj: la unua en rubriko «*NIA MOVADO*» temas pri artikolo de István Eöry, titolita «*Kelkaj pripensoj pri Esperanto*» kun akraj kritikoj; la dua estas seslinia kaj koncernas «*Packunvenon en Landler*». El la argumentoj pri Esperanto ni citu: «*Esperanto ne sufiĉe utilas*». Pro kies kulpo? Necesas «*plifortigi la fakan aktivadon*». Krome «*Esperanto-kongresoj ne taŭgas... nur enuigaj renkontiĝoj, kie oni babildas multe, laboras iomete, kaj antaŭtenigas nenion!*». Necesas «*renovigi la pensmanieron kaj agadojn... la programoj ne plu estu tiaj, kiaj konvenis dum la 20-aj 30-aj jaroj*»... Ni bezonas «*argumentaditajn trafajn gisdate*»... Kio nova sub la suno? Kaj la dua informo koncernas «*solenan kunsidon pri solidareco kun Vjetnamio*». Ĉiu bone informita pri la tieaj okazantaĵoj bonvolu mem prijuĝi!

Dume, kvazaŭ por ilustraj la ĉi-suprajn kritikojn, oni povas legi el «NOVZELANDA ESPERANTISTO» (1-79) jenan indikon: «*Poste kunvenis sep Esperantistaj instruistoj, kiu diskutis lernolibrojn kaj financon, reelektis Profesoron C. J. Adcock kiel Prezidanton sed sukcesis trovi nek sekretarion nek kasiston. Antaŭis ĉefmanĝon la 2-a Komitat-kunveno, kiu ne tre sukcese aŭ sprite diskutis ĉu grupoj estu kluboj aŭ societoj!*». Vi, kara leganto, konkludu mem!

Jen la rikolto de «gravaj» faktoj, kiuj atingis nin en junio 1979, vere malabunda! Kaj ĝi estus malkuraĝiga, se ĉiuj Esperantistoj restus laŭ la esprimo de d-ro L. L. Zamenhof «kiel blindaj ŝafoj» mutaj antaŭ siaj tondantoj! Feliĉe la legantoj de «HORIZONTO» ne estas tiaj, kaj ilia ekzisto konsciigas la prezidanton Tonkin pri lia respondeco!

Jean Thierry



“Agadi per lernolibroj, anoncoj, k.t.p. estas tre bone kaj necese; sed tio ĉi devas havi lokon *apud* la literaturo kaj ne *anstataŭ* la literaturo.”

L. L. Zamenhof

LIBROJ SUB LA LUPEO

«UNA LEVE AMETRALLADORA EN LA SANGRE» (Leĝera mitralo en la sango).

Sub tiu titolo ni ricevis por recenzo, libron de Amschel Paz, hispana moderna veskisto. Nia kunlaboranto G. Mora i Arana opinias pri ĝi.

Hispanlingvanoj kaj scipovantoj de tiu grava idiomu havas la ŝancon legi rakontlibron kiu certe vekos ilian intereson — ilian entuziasmon aŭ malaprobon: ĉar la verko de Amschel PAZ estas kontraŭkonvencia kaj havas la kapablon aŭ la virton restigi nenium indifera. Ĉu ĝi posedas sufiĉan pipron por flati la palaton aŭ brogi ĝin? Ho, jes!, — laŭ mia opinio. Al neniu ĝia spiceco povas savori je vulgara dolĉaĵo.

La maniero, aŭ la teĥniko, rakonti kaj priskribi la ideojn, fontas je la sama roko el kiu estas farita la kritika pensmaniero de la aŭtoro, kiu konstante ludas per la risortoj de akra satiro, kaj de ironio, kvazaŭ li svingus vipon.

La verkisto deziras esti tiel objektiva, ke li strategie adoptas la atutan esprimmanieron de la absurdeco. Li eskapas el la rutino, kaj li renversas, ŝajne, la mondon, por ke ĝi ekvilibriĝu kaj adoptu la nepran pozon postulatan de la socia ĉiutageco. Vere, do, ĉio aspektas kiel groteska ekzercado de vortoj kaj vortosencoj celantaj... ĉu kion? Ke ĉiu akuzu sin. Ke ĉiu abomeni sin. Tiuj, kiuj nur emas flati sin, jen, ili ne longe turnados la paĝojn.

Amschel Paz ne pretendas krei specialan humoron, ĉar li ĉion diras per serioza konvinko ke oni devas tuj rompi ĉiun ŝablonon. La dialogoj estas tre specialaj: malmultsilabaj kaj plenaj je intenca absurda patoso, por ke ĉiu leganto senmaskigu sin aŭ fermu abrupte la libron.

—Kuraĝuloj, lasu tenti vin! La paĝoj de Amschel Paz vin atendas, dum mitralo pa-

fadas senripoze el la fortreso de nia sango.
G. Mora i Arana

RAPORTO PRI VOJAĜO AL KAJ TRA ĈINIO. Ingrid Plazotta, Wien. 9 tajpitaj paĝoj.

La aŭtorino rakontas la plenumiĝon de sia knabina revo viziti iam la «misteran» malproksiman landon.

Inter ŝia revo kaj ĝia efektiviĝo pasis multaj jaroj; sed la longega atendado plivalorigis la viziton. Tial ŝi povis miri pro la afableco, la ĝentileco, la servemo, la sindono, la helpemo de la landidotoj, kiuj ĝenerale faris por ŝi ĉion imageblan por komplezo.

Ŝi rakontas pri la belaĵoj, moroj kaj sociaj ŝanĝiĝoj en la ĉina lando; la pian honoradon de la popolo al sia gvidinto Mao, kies balzamitan korpon ŝi povis vidi en lia maŭzoleo.

Krom du-tri tajperaroj mi trovis «jam komencis» anst. *komenciĝis* «ke li dediĉis sin» anst. *dediĉas*; «la ge-etuloj» anst. *geuletoj*; kaj la ne rekomendindan «ne jam» anst. *ankoraŭ ne*.

Resume mi povas diri, ke oni legos kun ĝuo tiun klaran, bonlingvan rakonton kiel stimulumon por vojaĝo al tiu unika lando.

Salvador Gumá

La Esperanto-Redakcio de ORF Wien, Aŭstrujo, sendas senpage po unu ekzempleron al ĉiu petanto (ĉu aŭskultanto, ĉu ne).

SENNACIECA REVUO. Jara kajero 1979. Eldono de S.A.T., Paris. 60-paĝa, ilustrita. Prezo de la kajero: 15 FF. aŭ 3,50 US \$ aŭ egalvaloro.

Kiel kutime tre interesa eldonaĵo en bona lingvo.

V - a INTERNACIA KONFERENCO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

Okazonta en Ateno, Grekujo, de la 8-a ĝis la 15-a de septembro 1979

Korespondadreso:
S-ino Adda Sakellaropoulou
Sokratous 48, Ominia, ATHENO (101)
Grekujo

Konferencejo:
Universitata Domo de la Nacia Organizo
Reĝo Paulo

ĈEFTEMO DE LA KONFERENCO

«Instruado de la Internacia Lingvo Esperanto (lerneja kaj eksterlerneja) kun aparta konsidero al la situacio en Eŭropo.»

La ĉeftemo estos pritraktita en formo de prelegoj kun postaj diskutoj. Estas antaŭ-viditaj 4 - 5 prelegoj de kompetentaj specialistoj.

Aldone al la ĉeftemo, la Konferenco pritraktos nombron da aktualaj demandoj de la Neŭtrala Esperanto-Movado.

Dum la Konferenco okazos ankaŭ kunveno de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj kaj ev. de aliaj fakaj organizoj.

La Organiza Komitato preparas aron da interesaj kulturaj aranĝoj, ekskursoj kaj distraĵoj.

PROVIZORA PROGRAMO

pri distroj kaj ekskursoj

8 septembro: Interkona Vespero.

9 septembro:

matene — Solena Inaŭguro.

vespere — Enurba ekskurso.

10 septembro: Greka Vespero. Popolaj dancoj en teatro de Dora Stratou.

11 septembro: Bankedo.

12 septembro: Duontaga ekskurso al promontoro Sunio.

13 septembro: Tuttaga ekskurso al la fama antikva orakolejo Delfi.

14 septembro: Prezento de Atena Festivalo.

15 septembro: Solena Fermo de la Konferenco.

NE FORGESU:

Frua aliĝo al la Konferenco estos grava helpo por la Organiza Komitato.

La nova statutprojekto de UEA fontas el la hamburgaj eventoj, kiel antaŭvidite en *Hamburgo en Retrospektivo*. Legu ĝin por informiĝi kaj atentigu viajn geamikojn!
